

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Monique Arnaud

Wera kaj Detlev Blanke

Mireille Grosjean

Dennis Keefe

Zsófia Kóródy

Katalin Kováts

Elisabeth Le Dru

Stefan MacGill

Radojica Petrović


Dima Ševčenko

Bert Ŝuman

László Szilvási

Kristin Tytgat

ilei





Supre: Grupa foto dum AMO 7 en Lomeo, Togolando. *Malsupre:* Grupa laboro. Okazis prelegoj kun aktiva laborado de ĉiuj pri starigo kaj estrado de loka klubo (R. AFANTCHAO), pri Afrika Agado (A. ADJE), pri koridoro agado (M. GROSJEAN), pri konstruado de retejo (A. AGBOLO).



Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La Sapienza”;
AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Płona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Titolpaĝe:

*Nelson MANDELA, (1918-2013)
Nobel-pacpremiito en 1993.
„Longa marŝado al libereco”,
700-paĝa aŭtobiografio.
Vidu parton de ĝi sur paĝoj 21-23.*

Enkonduko

Karaj legantoj!

Jen komenco de nova jaro. Ĝi estos
grava jaro pro diversaj kialoj.

Certe multaj e-istoj iros al Lillo por la
centa UK. Kelkaj el la foraj landoj ne
saltos al Francio por semajno, sed
veturos iom tra Eŭropo. Oostende, nia
konferenca loko, allogas ilin. Plie ILEI
ofertas rabaton al homoj, kiuj organizas
karavaneton de komencantoj al tiu
urbo. Do la junulargastejo svarmos kaj
zumados dum plena semajno.

Certe la Tria Tutmonda Kolokvo estos
grava evento dum la svisa printempo.

Ĝuu nian IPR-on! Ĝuu nian periodaĵon
Juna Amiko! Lernu mem kaj instru al
aliaj! Jen la daŭraj taskoj de ĉiuj!

Mireille GROSJEAN

Karaj legantoj!

IPR 2014/4 estis iom nekutima, ĉar
titolpaĝe aperis mia portreto kaj eĉ du
artikoloj okupiĝis pri mi okaze de mia
20-jariĝo ĉe IPR. (La ideo venis ne de
mi, sed de Mirejo). Mi kore dankas
ĉiujn gratulojn kaj bondezirojn ricevi-
tajn en IPR kaj tra retaj kanaloj.

Krome, en la nomo de nia redakcio mi
gratulas al Mirejo, kiun *La Ondo de
Esperanto* proklamis 'Esperantisto de
la jaro 2014' pro ŝia afrika agado, la
gvidado de la 47a konferenco en
Montevideo kaj la preparado de nia ĉi-
jara kolokvo en Svislando.

Jozefo NÉMETH

ENHAVO

<i>Enkonduko</i> (Mireille GROSJEAN – Jozefo NÉMETH):	3
Katalin KOVÁTS: <i>Retrorigarde al la KER-ekzamenoj</i>	5
Dennis KEEFE: <i>Pedagogio estas por infanoj. Andragogio estas por plenkreskuloj</i> .	9
Elisabeth LE DRU: <i>Ludi kaj senkonscie lerni!</i>	17
Mireille GROSJEAN: <i>Fulmrapida komparo</i>	20
Nelson MANDELA: <i>Longa marŝado al libereco</i> (fragmento, tr. M. GROSJEAN)	21
Mireille GROSJEAN: <i>ILEI kaj UNESKO</i>	23
Mireille GROSJEAN: <i>Instrui pacon</i> (responde al Mihai TRIFOI)	24
<i>El la landoj kaj sekcioj</i> (FR, DE, CU, NP, RU)	25
<i>Por via notlibro</i> (László SZILVÁSI, Wera kaj Detlev BLANKE, Stefan MACGILL) .	32
<i>Pri niaj konferencoj</i>	34
– <i>Dumkonferencaj kursoj por komencantoj</i> (Radojica PETROVIČ)	34
– <i>Lingva justeco kaj paco: Kiuj defioj por la nuna mondo?</i> (Kristin TYTGAT)	34
– <i>ILEI 2016: Konferenco en Hungario kaj festivalo en Kroatio</i> (R. PETROVIČ)	36
<i>Redakciaj informoj</i>	39
<i>Informoj pri ILEI</i>	39
<i>Adresaro de la sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj de ILEI</i>	41

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 7969 709 66. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Reprezentanto de ILEI ĉe UEA.

Vicprez.: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso hejmaj: (+49) 5521-5983. E-centroj, ekzamenoj, ALTE.

Vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitatoj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Sekretario: Radojica PETROVIČ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. hejma (+381) 32 371053. Konferencoj, rilatoj kun TEJO.

Vicsekr.: Magdaléna FEIFIČOVÁ „Fejfi”, Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.officejo@gmail.com>. Membro-administrado. Rilatoj kun FEL.

Estrarano: Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo. Tel. (+1) 620 9877. <nepa.1990@gmail.com>. Universitatoj. Komisiito por helpi al aliĝpetoj.

Estrarano: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario. <enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365.

Kalendaro, ekzamenoj, multlingva paĝaro www.ilei-mondo.info, varbado.

Estrarano: Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Lerneja agado.

Retrorigarde al la KER-ekzamenoj

En decembro 2014 finiĝis la unuaj 6 jaroj de la KER-ekzamensistemo. Ekde la 31a de decembro 2008 UEA kaj la budapeŝta ekzamencentro ITK okazigas ŝtate agnoskatajn, unulingvajn ekzamenojn pri Esperanto. Estas proponataj tri niveloj (el la sesŝtupa skalo). La sistemo estas ellaborita surbaze de la Komuna Eŭropa Referenckadro kaj agnoskata de la *Asocio de Lingvo-Testistoj de Eŭropo (ALTE)*. UEA estas membro de ALTE, kaj niaj reprezentantoj regule partoprenas ĝiajn kongresojn kaj aranĝojn.

La fakto, ke ni havas ekzamensistemon, kiu kongruas kun la plej prestiĝa sistemo en Eŭropo, kaj ni disdonis jam 1500 atestilojn al kandidatoj el 65 landoj, estas por Esperanto kaj por nia movado grava lingvopolitika venko, kiun ni devas konservi kaj plu flegi.

Nombro de kandidatoj laŭ tempo (entute: 1509)

Jaroj	Monatoj												Entute
	jan	feb	mar	apr	maj	jun	jul	aŭg	sep	okt	nov	dec	
2014	33	0	0	0	181	0	18	27	0	0	0	0	259
2013	0	0	0	22	0	210	29	10	0	0	18	0	289
2012	0	27	0	28	0	326	17	42	0	0	0	24	464
2011	0	13	0	34	31	0	125	18	0	5	0	0	226
2010	0	0	0	12	0	0	77	21	0	27	0	9	146
2009	0	0	0	12	13	0	59	0	10	0	0	23	117
2008	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	8	8

Entute okazis 45 sesioj en 30 landoj. 17 el la landoj havis propran sesion, kun fizika ĉeesto de komisiono. La aliaj estis envolvitaj nur kadre de la tutmondaj ekzamentagoj.

UEA nomumis trikapan Ekzamenkomisionon, kiun gvidas Katalin KOVÁTS. La aliaj du membroj estas Zsófia KÓRÓDY kaj Renato CORSETTI. Pro la involviĝo de Katalin KOVÁTS, ŝia retejo, edukado.net, fariĝis la ĉefa loko de la organizado de la ekzamenoj. Tie eblas aliĝi al la sesioj, kaj tie okazas la informado, varbado, disvolviĝas la pretigo de lokaj organizantoj kaj helpantoj, ĉefe kiam temas pri la tutmondaj sesioj.

La Tutmondaj Ekzamentagoj havas vere gravan rolon kaj bezonas tre ampleksan kunordigadon. Okazis tia tago en la lastaj sinsekvaj tri jaroj kun plurcento da partoprenantoj, en ĉ. 20-25 lokoj en dudeko da landoj. Tiuj ekzamenkampanjoj estis inventitaj kaj lanĉitaj de Katalin ĉefe ĉar la samtempa okazigo de sesioj en diversaj mondpartoj ebligis ekonomian uzon de la samaj testoj. Ne neglekteblas aliflanke, ke la samtempeco donis okazon por grupaj kaj vastaj kampanjoj kaj reklamo ankaŭ ekster la movado. Tiujn eblojn en pluraj lokoj, ekzemple en Francio, oni tre bone utiligis aperigante artikolojn, engaĝante lokajn gravulojn kaj amas-komunikilojn. En la unua jaro okazis nur skribaj ekzamenoj en tiu semajnfino, sed en la postaj jaroj, helpe de la moderna tekniko kaj retaj ebloj, en pluraj lokoj estis aranĝitaj ankaŭ parolaj sesioj. De jaro al jaro en la tutmondaj ekzamenoj sesdek-sepdek personoj kunlaboris fiere kaj sindediĉe por la sukcesigo de la ekzamenoj.

La eventoj de la ekzamenoj, precipe tiuj de la tutmondaj, kaj la disdono de la atestiloj, kiujn oni aranĝas publike kaj feste – ekzemple ankaŭ dum la kongresoj – havas la forton de enmovada varbado.

Post la unuaj jaroj la ekzamensistemo paŝon post paŝo ekhavas prestiĝon, oni fieras pri sia atestilo, aliaj volas same trapasi ekzamenojn. Estas pluraj lokaj aŭ landaj estraroj, kie la membroj trapasis KER-ekzamenon. Dekoj da geedzaj paroj, aŭ gepatroj kun filo aŭ filino kune ekzameniĝis. En januaro 2015 ekzameniĝos la 14-jara filo de la familio Oliveira BISCOTTO el Brazilo, kaj se li sukcesos, ili estos la unua kompleta familio kun infano, kies ĉiuj membroj posedas KER-atestilon.

Kelkaj e-istoj laŭpaŝe trairas la tutan skalon kaj sinsekve ekzameniĝas. Estas ĝis nun 22 personoj, kiuj post sukcesaj ekzamenoj akiris 3 diversajn atestilojn. Aliaj 6 kandidatoj posedas 4 atestilojn kaj unusola, Unia LUCETTE (FR), la ĉampionino, havas 5 atestilojn de diversaj tipoj kaj niveloj.

La liston de la 1509 kandidatoj, pri kiuj ni fieras, vi povas legi en la retpaĝo <http://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj>. Se vi ekzameniĝis kaj ne aprobis ankoraŭ tie la aperigon de viaj datumoj, bv. fari tion. La liston ni konsilas uzi kiel gravan argumentilon dum la pledado por enkonduko kaj/aŭ instruado de Esperanto.

La ekzamenokazoj laŭnivele dividiĝas en relative bona proporcio. 413 personoj sukcesis sur la nivelo B1, 452 sur B2 kaj 644 sur C1. Nia teamo nun laboras por preparo kaj lanĉo de nova nivelo, nome de A2, por speciala publiko, por junuloj. Ĝi ebligas, ke tiuj, kiuj en lernejoj lernas Esperanton, povos trapasi oficialan ekzamenon.

En la lastaj jaroj pretiĝis analizo pri la proporcio de sukcesoj kaj malsukcesoj. La rezultoj montris du gravajn pripensendaĵojn. La plej alta nombro de fiaskoj okazas je nivelo B1 (ĉ. 20%), kaj apenaŭ okazas en nivelo C1. Estas jaroj, kiam neniu malsukcesas en tiu alta nivelo.

Alia observaĵo estas, ke la malsukcesoj grupiĝas ne ĉirkaŭ unu aŭ du konkretaj ekzamenoj (do, ne la testoj kulpis), sed ĉirkaŭ kelkaj ekzamenlokoj, kie aŭ la nekono de postuloj aŭ la iom altruda stimulo al ekzameniĝo kaŭzis la problemojn. Estonte necesos atenti pri tio.

Ĉiuokaze multe helpas kaj tre laŭdindas tiuj iniciatoj, kiam la kluboj okazigas specialajn kursojn kaj preparsesiojn antaŭ la ekzameno, kaj la esperantistoj, kiuj normale konsideras sin jam „pretaj”, do neniam sekvas kursojn, por la ekzamenoj konscie ekstudas gramatikajn librojn, sisteme riĉigas sian vortprovizon, solvas testojn kaj ekzercojn, kio bone montriĝas ĉe la elŝutoj de miloj da tiaj materialoj ĉe edukado.net. Danke al la studado la kandidatoj malkovras siajn erarojn. Tiuj atingiĝoj estas eble la plej gravaj valoroj de la ekzamsistemo, ĉar la ĉefa celo estas altigi la lingvonivelon de la membroj de nia komunumo.

Rigardante la nombron de la ekzameniĝintoj, Francio, lando, kiu havas bonegan kaj seriozan landan ekzamsistemon, elstaras kaj en la ekzameniĝoj kaj en la okazigo de ekzamenoj. La sekva en la ranglisto estas Brazilo, kaj en la tria loko staras Rusio. Tiuj tri landoj ne nur kvante estas en la samaj pozicioj, sed ankaŭ en la valoro de la ekzamenoj. Ni aplikas sistemon, laŭ kiu ni atribuas poentojn por la diversaj

Listo laŭ la nombro de ekzamenokazoj		Pozicio	Listo laŭ la poentoj kaj valoro	
Francio	385	1	Francio	1180
Brazilo	182	2	Brazilo	619
Rusio	118	3	Rusio	319
Meksiko	92	4	Germanio	258
Germanio	63	5	Italio	240
Italio	51	6	Meksiko	168
Ĉinio	49	7	Pollando	162
Hispanio	39	8	Hispanio	156
Svislando	38	9	Belgio	139
Sud-Koreio	38	10	Nederlando	130
Belgio	38	11	Usono	124
Pollando	36	12	Svislando	114
Nederlando	32	13	Ĉinio	95
Japanio	32	14	Japanio	84
Kolombio	31	15	Finnlando	80
Finnlando	29	16	Sud-Koreio	76
Usono	29	17	Kolombio	73
Argentino	24	18	Argentino	62

partoj laŭnivele. C1K (kompleksa) valoras 6 poentojn, B2K-ekzameno 4 poentojn, B1K 2 poentojn. Skriba aŭ parola aparte valoras la duonon de la koncerna nivelo.

Laŭ tio, landoj, kie malpli da personoj ekzameniĝis, sed sur pli alta nivelo, povas atingi pli bonan pozicion en la laŭpoenta kaj fakte laŭkvalita listo, ol tiuj, kie ekzameniĝas pli da kandidatoj, sed sur malalta nivelo.

La listigitaj atingiĝoj en pluraj landoj ligiĝas al specifaj agadoj, personoj aŭ lokoj. En Francio Greziljono fariĝis jam tradicia ekzamenloko, kaj krom tio el deko da urboj en pluraj lokoj okazis ĉiun fojon tutmonda sesio. Dankon al geedzoj PLUTNIAK en Arras, al Pierre TELLE BOUVIER en Limoĝo kaj Didier JANOT en Parizo. Brazilanoj regule okazigas sesiojn dum la landa kongreso, kaj Kuritibo partoprenis ĉiujn tri tutmondajn sesiojn. En Rusio menciendas la forta organiza teamo kun pluraj sesioj en Moskvo, kaj po unu jara sesio en Jekaterinburgo kaj Ĉeboksaro.

En Meksiko ni dankas Mallely MARTÍNEZ kaj Martin SCHÄFFER pro la senlaca kaj sistema laboro. En Germanio Herzberg ludas grandan rolon. Por la italoj ĉefe la italaj kongresoj kaj tieaj ekzamenoj portis la gloron. En Ĉinio laŭdendas la agado kaj varbado de GONG Xiaofeng (Arko), en Svislando de Mónika MOLNÁR en la lernejo Granda Ursino en La Chaux-de-Fonds, kaj en Sud-Koreio ni dankas la UEA-estraranon LEE Jungkee. Regula kaj persista varbado kaj ekzamenado okazis en Kolombio, danke al Ruben TORRES kaj liaj klubanoj, kaj en Argentino danke al la tie aganta Petra SMIDÉLIUSZ.

Apartan dankon meritas Christophe CHAZAREIN, Dorota RODZIANKO, Victor SOLÉ, Jannick HUET pro la bona laboro en la memstaraj sesioj de Greziljono, Nitra kaj Ronda. Sen la helpoj de Derek ROFF, Joseo Roberto TENORIO kaj Ivan COLLING en multobligaj kaj loĝistikaj taskoj ni malfacile elturniĝintus.

Ankaŭ la kolegoj ĉe ITK; Márta KOVÁCS, Pálma CSISZÁR, Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ kaj la administranto Csongor NEMODA ricevu nian dankon. Kaj fakte ĉiuj dankindas, kiuj iel helpis kaj ankaŭ tiuj, kiuj ekzameniĝis. Do, brave al ni ĉiuj!

Estonte la KER-sistemo kaj ĝiaj laborformoj ne multe ŝanĝiĝos. Ni daŭre okazigos tutmondajn ekzamentagojn kaj certe estos sesioj dum la

Universalaj Kongresoj. Plue mendeblis sesioj por landaj kongresoj kaj aliaj multnombraj aranĝoj.

La aktualaj sesioj ĉiam videblas en la paĝo, kie aperas ankaŭ la aliĝiloj: www.edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj

Por sekvi la aktualajn membrokotizojn de UEA – surbaze de kiuj ni difinis la ekzamenkotizojn – almenaŭ en unu kategorio ni efektivigos etajn kotizaltigojn. Nur en la baza landkategorio (por landoj kiel ekz. Francio, Usono ktp.) parola aŭ skriba sesio en B1-nivelo de 34 eŭroj altiĝos al 35 eŭroj, ĉe B2-nivelo de 37 eŭroj al 40 eŭroj, kaj en C1-nivelo de 42 al 45. La kotizo de la kompleksaj ekzamenoj estos do B1: 70, B2: 80 kaj C1: 90 eŭroj: www.edukado.net/ekzamenoj/ker/kotizoj.

En la aliaj kategorioj ni ne modifis la prezojn, ĉar eĉ tiel por ke kandidatoj el nepagipovaj landoj povu ekzameniĝi, ni bezonis trovi sponsorojn, financan subtenon, krom tiuj ĉ. po 10 eŭroj, kiujn UEA aldonas al ĉiu kandidato el tiuj landoj. Dankon al Synnöve MYNTTINEN, Ranieri CLERICI kaj Leif Arne STORSET, kiuj en la pasintaj jaroj per signifaj sumoj ebligis al cento da homoj ekzameniĝi. Dankon al ĉiuj, kiuj per malpli grandaj, sed valoraj subtenoj same helpis.

Pliajn informojn, detalajn klarigojn, raportojn, statistikaĵojn, fotoalbumojn, helpmaterialojn kaj specimenojn, fakte ĉion pri la ekzamenoj vi trovas en la sekcio EKZAMENOJ ĉe www.edukado.net aŭ informiĝu ĉe ker-ekzamenoj@edukado.net.


Ni daŭrigu la laboron, senhalte kaj entuziasme, ĝis la sekvaj etapoj, al la 2000-a, 3000-a, 5000-a sukcesaj ekzamenoj kaj atestiloj.

Katalin KOVÁTS

Pedagogio estas por infanoj. Andragogio estas por plenkreskuloj

Laŭ la eminenta edukisto pri plenkreskula lernado (priatentu: *plenkreskula*, ne *infana*), Doktoro Malcolm KNOWLES [vd la foton *sekvapaĝe*], profesoro kaj aŭtoro de pli ol 200 artikoloj kaj libroj pri lernado kaj instruado por postuniversitata studado, ekzistas fundamentaj diferencoj inter infanoj kaj

plenkreskuloj rilate lernadon kaj instruadon. Infanoj lernas pedagogie, sed plenkreskuloj andragogie. Por simpligi, infanoj alproprigas sciojn per metodoj speciale adaptitaj por infanoj, kaj plenkreskuloj per metodoj adaptitaj por ili. Instruistoj kiuj sukcesas en la elementa aŭ meza lernejo kun infanoj aŭ junuloj, laŭ Malcolm KNOWLES, ofte malsukcesas kiam ili provas instrui plenkreskulojn. Tra jardekoj da studoj, esploroj kaj praktikaj spertoj, Knowles disvolvis teorion pri instruado de pli aĝaj lernantoj, la plenkreskuloj, (ĉefe por lernantoj post la universitataj jaroj, do inter ĉirkaŭ 20- kaj 100-jar-aĝaj), kaj en sia teorio, li listigas kiel bazon ses fundamentajn diferencojn inter junaj kaj maljunaj lernantoj. Tiuj ses principoj estigos la bazon de ĉi tiu artikolo.



Ofte en Esperantujo ni parolas pri instruado, sed tamen, ni ne pripensas pri la gravaj diferencoj inter la gelernantoj de diversaj aĝoj: tre junaj, junaj, mezjunaj kaj maljunaj gelernantoj. Baza eraro de edukado estas provi instrui same aŭ tro simile al ĉiaj gelernantoj. Pro tia malatentado pri tiu grava aĝotemo estus inde, ke ni iom trarigardu la teorion de Knowles kaj lernu kiel ni povas pli bone instrui al niaj plenkreskuloj, ĉar plenkreskuloj restas esenca ero de nia gelernantaro. Krome, estas ĝuste kun niaj kursoj por plenkreskuloj kie ni tro ofte vidas katastrofan forfalon de la nombro de gelernantoj inter la komenco kaj la fino de kurso. En Madrido, kie mi antaŭe instruis E-on, kursoj ofte komenciĝis kun pli ol 30 lernantoj, plenkreskuloj ĉiuj, kaj finiĝis kun malpli ol 5! Parto de la problemo estis la enhavo de la kurso mem, sed parto ankaŭ estis pro la tendenco instrui kurson al kvindekjarulo kvazaŭ li aŭ ŝi estus infano.

En ĉi tiu artikolo, mi uzos la terminojn *pedagogio* kaj *andragogio* laŭ la sekva difino de Knowles: pedagogio estas la scienco kaj arto instrui al infanoj; andragogio estas la scienco kaj arto helpi al plenkreskuloj lerni. Estas substrekinde en tiu difino, ke la emfazo en pedagogio estas pri INSTRUADO, dum la emfazo en andragogio estas pri LERNADO. En andragogio la instruisto HELPAS la lernanton memlerni, memstariĝi por ke tiu lernanto en la postaj monatoj kaj jaroj daŭre emu lerni. Ne tiom gravas bona aŭ perfekta instruado en andragogio, gravas bona lernado kaj preparo

por venonta lernado. La instruisto en andragogia rolo ne tiom instruas; li aŭ ŝi helpas al la plenkreskaj lernantoj iĝi dumvivaj lernantoj. En andragogia kurso por plenkreskuloj, la instruisto ne estas aktoro, nek magiisto, nek dinamika instruisto; la instruisto estas helpema, atentema pri la individuoj en sia klasĉambro. Antaŭ ĉio, en andragogio, la instruisto ne celas, ke la gelernantoj sekvu lin, ŝatu lin, sed celas, ke la gelernantoj sendependiĝu de la instruisto por iĝi motivitaj, dumvivaj memlernantoj.

Multe da esperantistoj pensas, ke Andreo CSEH estas ekzemplo de ege bona instruisto de E-o, sed en la kadro de pedagogio-andragogio, Cseh estas pedagogo, ne andragogo. Li jes ja instruis al plenkreskuloj, sed li multe pli utiligis metodojn pedagogiajn, ne andragogiajn. Andragogo ne tro regas la gelernantojn de la klasĉambro; en la kurso de Cseh, tamen, ĈIO estas regata, kontrolata, kaj la instruisto ĉiam estas la centro de la instruado, kvazaŭ reĝo sur trono, tute kontraŭe al bona andragoga kurso, kie la instruisto ofte ne centras, sed flankas kaj rolas kiel helpanto, servanto, ne kiel ĉiopova, ĉionscianta manipulanto de la lernoprocezo. Se vi observas bonan kurson de andragogo por plenkreskuloj, vi eble tute ne rimarkos, ke la kursgvidanto estas bona; vi rimarkos, ke la kursanoj estas bonaj, kaj ke ili volas studi kaj lerni Esperanton eĉ sen la instruisto. En bona kurso de andragogo, kiam la instruisto forlasas la klasĉambron, la gelernantoj daŭre lernas kaj studas, ĉar ili jam lernis labori sendepende.

Andragogio ne estas nova ideo, nova koncepto. La gelernantoj de Sokrato, de Platono, de Aristotelo, de Konfuceo, de Jesuo estis plejparte plenkreskuloj. Kaj kiam Aleksander KAPP, en la jaro 1833, enkondukis la vorton andragogio (*Andragogik*), li faris tion por priparoli la instruadon de Platono en Grekio al plenkreskuloj. Poste alia germano, Eugen ROSENSTOCK, interesa intelektulo kiu dufoje doktoriĝis ĉe la Universitato de Heidelberg, verkis libron titolatan *Andragogik*, kaj post kariero en Germanio, li migris al Usono kaj parolis kaj instruis pri andragogio tie. Tamen en Usono, la subfako de edukado kiu rilatis la instruadon de plenkreskuloj, kutime utiligis la anglan terminon *Adult Education* ĝis la sepdekaj jaroj kiam, refoje, la eŭropanoj konsilis al Malcolm KNOWLES la utiligon de tiu vorto andragogio. Kaj nun mi parolos pri andragogio, kaj ĝuste pri la teorio proponita de Malcolm KNOWLES.

La studofako andragogio estas multe pli ampleksa ol la idearo de Knowles, tamen, estas li kiu plej verkis pri tiu temo en la 20a jarcento, kaj lia

filozofio ankoraŭ tre influas la nuntempan pensadon pri instruado de plenkreskuloj kontraste kun tiu de infanoj. Laŭ Knowles, instruado de plenkreskuloj devas malsimili al tiu de infanoj, ĉar estas ses fundamentaj diferencoj inter infanoj kaj plenkreskuloj rilate lernadon kaj instruadon. Tiuj ses diferencoj ne estas absolutaj sed relativaj. Kaj tiuj diferencoj, kaj tio estas unu el la fundamentaj kritikoj de la teorio de Knowles, fokusiĝas multe sur la individuon, sed ne sur la socion en kiu vivas tiu individuo. Spite al tiuj kaj aliaj problemoj kun la teorio, ni trarigardu tiujn ses diferencojn inter infanoj kaj plenkreskuloj.

1. Kialo por lernado de plenkreskulo tre gravas:

Unu diferenco, laŭ Knowles, estas ke plenkreskulo bezonas scii ĝuste KIAL li aŭ ŝi devas lerni tiun aŭ alian temon. Infano, aliflanke, bezonas scii nur tion, kion li aŭ ŝi devas fari por sukcese kompletigi taskon EN la lernejo, aŭ por sukcesi en ekzameno. Kiamaniere apliki matematikon, geografion aŭ historion al la ĉiutaga vivo ne tre interesas infanon, sed por plenkreskulo tiu kurso pri geografio aŭ alia temo devas havi vivosencon. Plenkreskulo pensas pri siaj bezonoj: pri sia ekonomia vivo, pri sia familia vivo, pri sia socia vivo, ankaŭ pri siaj ŝatokupoj. En kurso pri matematiko, se nia plenkreskulo ĉeestas tian kurson, li aŭ ŝi demandas ne pri geometrio aŭ trigonometrio, sed ĉu tiu kurso kun tiaj scioj helpas lin/ŝin pli bone labori, pli bone perlabori monon, ĉu la kurso helpas lin en la familia vivo aŭ eĉ en hobia ktp.

Plenkreskuloj pensas multe pli pri konkretaj bezonoj. Indas, do, ke instruisto pensu iomete pri tio antaŭ ol doni lecionojn. Ĝuste KIAL nova lernanto povas profiti de la kurso de E-o? Ne indas tro rapide, aŭtomate kaj mekanike respondi al tiu demando. Bezonatas ekkoni la gelernantojn iom. La kialoj por studi ion ajn estas diversaj. Ekzemple, en unu lando dum unu brila studento studas medicinon por helpi kuraci malriĉulojn, alia studento studas por gajni kiel eble plej da mono; alia studas ĉar estas tradicio en la familio ktp, ktp. La esplorado de la motivoj por aliĝi al kursoj, esplorataj kaj priskribataj de D-ro Roger BOSCHER de Kanado indikas, ke estas sep ĉefaj motivoj por plenkreskula lernado kaj nur du el ili rilatas karierajn aŭ edukajn celojn. Aliaj du el la sep motivoj rilatas sociajn kialojn, kiuj staras tute ekster la temo studata. Ekzemple, en miaj kursoj en Madrido aŭ en la Kastelo Grésillon en Francio, kelkaj el miaj gelernantoj ne ĉeestis ĉefe por lerni E-on, sed por ekkoni novajn amikojn. Tio estas socia motivo por

lernado, kaj parte klarigas la fenomenon *eterna komencanto*. Estus trans la kadro de ĉi tiu artikolo paroli pli profunde pri motivoj kaj plenkreskula lernado, sed ĉiaokaze, ĉiu instruisto de plenkreskuloj povas pli bone lernigi aŭskultante la gelernantojn kaj informiĝante ĝuste kial ili ĉeestas la Esperantan kurson.

Klarigi al gelernantoj la kialon de ilia kurso povas plenumi fundamentan bezonon de pli aĝaj plenkreskuloj laŭ Knowles, kaj mi konsentas kun li pri tio. Tamen, kiam mi instruas gelernantojn de E-o ĉu en Azio, Eŭropo aŭ Nordameriko (mi instruis, ekzemple ĉirkaŭ 1500 horojn en Ĉinio per la BEK-Kurso www.bekkurso.info), mi ne diras al la gelernantoj kial ili devas lerni E-on. Mi ne parolas pri la komunaj menciataj avantaĝoj: Pasporta Servo, geamikoj en la tuta mondo, Universalaj Kongresoj ktp. Mi scias, ke mi probable eraras laŭ la nocio de Knowles kaj ankaŭ laŭ la rekomendoj de preskaŭ ĉiuj instruistoj de E-o, kiujn mi konas. Mi fokusiĝas nur sur la instruado de la lingvo mem. Mi lasas al la gelernantoj poste malkovri la avantaĝojn de E-o. Mi ne estas vendisto aŭ merkatikisto kiam mi instruas la Internacian Lingvon. Tute kontraŭe. Tiu aliro eble funkcias por mi, sed eble ĝi ne funkcios por aliaj instruistoj.

2. Plenkreskulo psikologie dependas de si mem, ne de instruisto:

Dua fundamenta diferenco inter la lernado de infanoj kaj plenkreskuloj estas, ke la membildo, la memkoncepto (angle, *self-concept*) de tiuj du malsamaĝaj grupoj tre diferencas laŭ Knowles. Simplavorte, infanoj dependas ĉefe de la instruisto por daŭrigi la lernadon, sed plenkreskuloj dependas de si mem. Memlernado estas ĉefe fenomeno de plenkreskuloj. Plenkreskuloj ekinteresiĝas pri iu temo, kaj poste komencas studi ĝin kun aŭ SEN instruisto. Esploristo Allen TOUGH de la Universitato de Ĉikago komencis studi ĝuste tiun temon antaŭ 50 jaroj, kaj malkovris neatenditan de li kaj de aliaj esploristoj, ke plenkreskuloj multe pli ofte memlernas ol oni antaŭe supozis. Doktoro Tough malkovris, ke surprize granda nombro da plenkreskuloj sendepende elektas temon kaj ekstudas ĝin plejparte ekster la tradicia kadro de niaj lernejoj kaj universitatoj. Unu ekzemplo de tio estas ĝuste tio, kion ni vidas en Esperantujo. Sen lernejo, sen instruistoj, sen instigo de esperanta asocio, homoj tra la tuta mondo, eble miloj, eble dekmiloj, eklernas ĝis certa nivelo Esperanton. Laŭ profesoro Tough, en Usono, ĝis 90 elcentoj de la adolta loĝantaro pripensas eklerni ion dum tipa jaro, kaj la plejparto de tiu lernado estas SENDEPENDA.

Kiamaniere tiuj seninstruistaj plenkreskuloj lernas sendepende? Ofte ili komencas per libro pri iu temo, kiu ekinteresas ilin. Poste ili eble parolas kun geamikoj, kiuj scias ion pri la temo. Eble ili serĉas indajn videojn pri ĝi sur la Interreto, aŭ eĉ trafoliumas retan kurson. Ankaŭ eblas, ke poste ili aliĝos al kurso en vespera lernejo aŭ eĉ en universitato. La vojoj de sendependa lernado estas multnombraj, kaj studado de la sendependeco de la plenkreskulo kaj lernado de Esperanto povas esti fruktodona esploroĵo por esperantistoj.

3. Plenkreskulo havas multe da vivosperto, eĉ pli ol kursgvidanto:

Tria diferenco inter junaj kaj maljunaj gelernantoj rilatas al vivosperto. Pri tiu tria kategorio de Knowles, preskaŭ ĉiuj interkonsentas, ke tio estas la ĉefa diferenco inter la du aĝo-grupoj. La vivospertoj de plenkreskulo diferencas kaj kvante kaj kvalite de tiuj de infanoj. Kaj estas tiu sperto kiu povas radikale ŝanĝi la lernadon de la kursano kaj la instrumanieron de la kursgvidanto. Plenkreskulo kiu alvenas al kurso je la aĝo de 30 jaroj, 50 jaroj, 70 jaroj havas multege pli da sperto pri preskaŭ ĉio: li legis pli da libroj, vojaĝis pli, ĝojis kaj malĝojis pli, laboris pli, sukcesis kaj malsukcesis pli, kredis kaj miskredis pli ... Instruisto kiu ne priatentas la riĉan vivosperton de la gelernantoj, laŭ Knowles, mistrafos en la instruado. Uzi kurson por infanoj en la kadro de plenkreskuloj povas forfuĝigi multe da pli jarohavaj lernantoj. Mi multe miras vidi eĉ spertajn instruistojn, kiuj faras tion. Nia eminenta instruisto, Andre CSEH, surprizas min kiam li eniras en klasĉambron kun menaĝerio de plastaj kaj ŝtofaj bestetoj kvazaŭ li estus en kurso por okjaruloj. Mi scias, ke Cseh multe sukcesis instrui, sed mi ankaŭ scias, ke li estis ege sperta parolanto antaŭ plenkreskuloj, estinte pastro en la katolika eklezio. Eble li povis adaptiĝi sufiĉe bone al tiaj porinfanaj metodoj kiujn li utiligis, sed mi ege dubas ĉu mi kaj la plejparto de la Esperantaj instruistoj povas fari simile.

4. Plenkreskuloj ĉiam pretas lerni se ili BEZONAS lerni:

Kvara diferenco inter enlernejaj lernantoj kaj postlernejaj lernantoj estas tio, kion Knowles nomas preteco por lerni (angle, *readiness to learn*). Plenkreskulo lernas ion novan kiam li aŭ ŝi pretas lerni tion, ne kiam la kurso ekaperas en la kronologia listo de lernotemoj en lernejo. La ritmo de la lernejo kaj la ritmo de la vivo ne ofte kongruas. Knowles, utiligante la teoriojn kaj nociojn de Erik ERIKSON, R.J. HAVIGHURST, Gail SHEEHY kaj

de aliaj psikologoj, esploristoj kaj verkistoj, diras, ke estas la ŝanĝoj en la vivovojo de plenkreskulo, kiuj ofte motivas tiujn pli aĝajn homojn aliĝi al kurso aŭ fariĝi memlernanto. Havighurst nomas tiujn tempospacojn lern-favoraj momentoj, en la angla *teachable moments*. Espereble kurso de E-o bone enplektiĝas en la vivodisvolviĝon de plenkreskulo kaj koincidos kun tiuj lerno-momentoj, ĉar se ne, malfacile ni esperantistoj povas allogi kaj reteni niajn lernantojn en niaj klasĉambroj. Indus ke e-istoj komencu multe pli pristudi tiujn vivoŝanĝojn ĉe plenkreskuloj. Ekzemple, baza konsidero estas la tiel nomataj mejloŝtonoj de la vivo: diplomiĝo ĉe universitato, ge-edziĝo, naskiĝo de infano, laborŝanĝo, morto de kunulo, divorco, emeritiĝo ktp. La grava rolo de lernomomento signifas ankaŭ, ke indas, ke kurs-gvidanto bone sciu kial ĉiu individua lernanto pretas lerni E-on ĝuste en tiu momento.

Kiel ĵus dirite, ŝanĝoj rilate pretecon lerni ofte enviciĝas en la mejloŝtonaj ŝanĝoj, sed estas multe da aliaj vivoŝanĝoj, ne tiel sentebaj kaj palpeblaj por ni. Ekzemple, homo decidas, ke ne plu gravas en lia vivo la perlaborado de kiom eble pli da mono, sed gravas la ĝuado de la ĉiutaga vivo. Tio ĝuste okazis al mi antaŭ ĉirkaŭ 30 jaroj, kiam mi plejparte forlasis la tradician, komercan vivon kaj ekbrakumis vivon kun ĝuado de lingvolernado kaj vivado en aliaj landoj kaj kulturoj. Ĝuste en tiu ŝangomomento mi pretis lerni E-on, ne antaŭe. Kiam mi estis merkatikisto ĉe IBM, konvinki min lerni E-on estus neeble, ĉar mi pensis nur pri merkatika kariero en la mondo de informadiko.

5. Plenkreskulo volas lerni por trovi solvon al SIAJ problemoj:

Alia signifa diferenco inter infanoj kaj mezjunuloj/maljunuloj estas tio, ke plenkreskulo aliras lernadon kiel instruigon pri specifaj taskoj, kaj tiuj taskoj servas por solvi specifajn problemojn de la ĉiutaga vivo aŭ de la kariero. Infanoj, aliflanke, aliras lernomaterialon kiel objekton, studotemon, nuran aferon de lernejo. Do, plenkreskulo ne konceptas kurson pri geografio kiel trimonatan lecionaron pri regionoj kaj landoj, montoj kaj valoj, riveroj kaj oceanoj, sed konceptas ĝin kiel helpilon, eble, por venonta turisma vojaĝo dum ferioj tra Azio, ekzemple. Infano ne pensas pri iu baldaŭa vojaĝo, sed pri iu baldaŭa raporto kiun li aŭ ŝi devas verki por la instruisto. En la vortoj de Knowles, plenkreskuloj aliras kurson kun fokuso vivo-centra, tasko-centra, problemo-centra. Plenkreskulo serĉas la partojn de la lernado, kiuj rekte rilatas al lia vivo kaj liaj vivo-kondiĉoj. Por esti

bonaj instruistoj de plenkreskuloj, niaj esperantaj kursgvidantoj bezonas pensi pri siaj kursanoj kaj kiel ili pensas ne nur pri E-o, sed pri la vivo mem. Ĉiuj lernantoj malsimilas.

6. La motivoj por lerni estas ĉefe internaj, ne malinternaj:

Finfine, la sesa diferenco inter plenkreskuloj kaj infanoj rilate lernadon konsistas el diferencoj de interna motivado kaj de ekstera motivado. Knowles skribas, ke plejparte plenkreskuloj estas motivitaj interne: ne gravas ĉu ili ricevas multe da poentoj de la instruisto aŭ ne; gravas ke ili lernu tion kion ili volas lerni. Infanoj kaj junuloj ofte laboras ĉar la instruisto aŭ la gepatroj diras, ke estas bone ke ili studu kaj lernu. Plenkreskuloj ne bezonas instruistojn kiuj staras ekstere, por motivi ilin; plenkreskuloj ĉerpas motivojn el si mem. Ĉu la poentaro en la ekzameno altas aŭ ne tiom altas, ne gravas al plenkreskulo. Li aŭ ŝi kutime preferas pritaksi sin mem.

Resume, estus bone se ni e-istoj komencus pripensi pri la instruado de E-o tra almenaŭ du grandaj lensoj: la pedagogia lenso kaj la andragogia lenso. Metodoj por infanoj ofte ne kongruas kun la bezonoj de niaj pli aĝaj gelernantoj. Unu kialo de la forfalo de plenkreskulaj lernantoj estas ke bonkora, sed pedagogia instruisto traktas ilin kiel infanojn. Pedagogiaj instruistoj ofte senkonscie ne volas, ke la gelernantoj sendependiĝu de ili. Kiel kelkaj gepatroj, tiaj instruistoj ne volas, ke ILIAJ gelernantoj foriru de la protektado de edukovartado. Tio tute ne estas sinteno de andragogo. Jardekoj da sperto en la instruado de speciale faritaj kursoj por plenkreskuloj montras multe pli bonajn rezultojn kiam la instruisto utiligas pli andragogiajn metodojn por la instruado de la pli aĝaj lernantoj. En la lastaj cent jaroj da instruado de E-o, oni tro ofte ne distingas inter bona metodo por infano kaj bona metodo por plenkreskulo. Kaj fakte, por fini, la nocio METODO preskaŭ malaperas kiam oni instruas plenkreskulojn andragogie. Estas tiom da diferencoj inter la anoj de tipa grupo da plenkreskulaj gelernantoj, ke ĉiu simpligo, ĉiu utiligo de ununura metodo finiĝas per manipulado kaj la miskompreno de homoj maturaj, profunde pensantaj, riĉaj je vivosperto. Andragogio estas por plenkreskuloj, kaj pedagogio estas por instrui al pli psikologie dependemaj lernantoj. Ni de ILEI, ni instruistoj de maturaj homoj, komencu pensi pri ĉio ĉi, por plibonigi niajn instruadon kaj sintenon rilate al novaj plenkreskuloj, kiuj venos al niaj didaktikaj pordoj.

Dennis KEEFE, la Universitato Florida Atlantic, Usono

Ludi kaj senkonscie lerni!

Pripensu substantivon, kiu komenciĝas per la sama litero kiel la unua de via antaŭnomo kaj preparu taŭgan geston. Ekz: Maria Muso (kurigi fingrojn antaŭ sin).

Gvidantoj de staĝoj ja bone konas tian ludeton, kies celo estas konatiĝo en la tagkomenco.



Alia ludeto:
Parole gvidi blindigitan homon por uzi lokajn prepoziciojn kaj akuzativon de movo.

En Vannes, Francio, plurfoje en la jaro mi kunigas esperantistojn por ludi ... kaj progresi. Post kelkaj jaroj de observado mi konstatis, ke kio mankas al multaj lernantoj de niaj esperantaj kluboj, tio estas praktikado de la lingvo. Ja ofte en kursoj oni prave instruas gramatikaĵojn kaj laŭtemajn vortojn, kaj kompreneble tiu bazo estas deviga.

Tamen, post ioma regado de la lingvaj reguloj, la kapabloj de iuj lernantoj pli-malpli stagnas. Samtempe, ili malkuraĝiĝas pri daŭraj klasikaj kursoj. Kion fari?

Potenca rimedo estas ludo.

Ludante, homoj malstreĉiĝas pri sia lingvonivelo. Ili senkonscie enkapigas esprimmanierojn kaj vorttrezoron. Ludante ili firmigas jam lernitajn nociojn, kaj uzadas la regulojn. Fine, ludante ili liberigas la parolkapablon kaj kaptas la okazon nature interŝanĝi ideojn en E-o.

De sep jaroj do, por kompletigi la kursoproponon al progresantoj de mia regiono, mi uzas perludan pedagogion. Mi organizas Sabatojn, en kiuj la tutan tagon de la 10-a ĝis la 17-a oni parolas E-on, ĉefe ludante. Kaj dufoje

en la tago, antaŭ- kaj post- tagmeze, okazas ŝajne „pli serioza” afero, nome gramatiktempo, dum kiu oni pritraktas apartan temon.

La ludoj povas esti

- Paroligaj ludetoj plej diversaj.
- Movaj ludetoj: iom da gimnastiko, dancetoj ...
- Vortludoj: kradoj (estas facile krei iujn pri la taga temo), krucenigmoj, enigmoj (Ekz. *Kion oni iam donis al vi, kio daŭre apartenas al vi, kion vi neniam pruntedonas sed kio estas uzata de ĉiuj viaj konatoj? SOLVO = via nomo*), ŝaradoj (Ekz. *unue: tio, sur kio ni vivas (R), due: 17a litero, trie: mezuras longon / tuto: uzita pro febro / SOLVO = termometro*)...
- Ĉiaj rolludoj. Ili ĉiam estas efikaj por motivi la staĝanojn kaj liberigi la parolojn.
- Sociludoj: mi aĉetis kelkajn en Esperantaj renkontiĝoj (memorludojn, Skramblon), elretigis aliajn (Triban Vivon, Bingon, lotoludojn), kreis iujn (domenojn, memorludojn), kaj ĉefe mem adaptis al Esperanto multajn jam ekzistantajn ludilojn (Anserludon, Skramblon, Trivialan Postkuradon, Bogolon, Dobolon, Desegnu-Divenu, ludon de la Homo-Lupo, Tabuon, Samopiniulojn ...).



Tiuj Sabatoj povus esti nur sinsekvoj de ludoj, kiuj kondukus ĉiudirekten, simple plibonigante la vort-trezoron kaj parolkapablon de la partoprenantoj. Tia rezulto en si mem estus jam pozitiva. Sed de la komenco mi opiniis, ke ja eblas fari pli: do ĉiufoje, mi elektas por la tuta Sabato kaj ĝeneralan temon, kaj gramatikan. El tiuj du temoj konsistas la ruĝa fadeneto, kiu ligas kaj gvidas maksimumon de la tagokazaĵoj.

Ekzemple, en la ses Sabatoj de la sezono 3, mi elektis *la kolorojn* kiel ĝeneralan temon. Kaj en la kvara, en januaro 2011, ni okupiĝis pri *blanko*. La gramatika temo estis tiam *ES-korelativoj*.

- ✓ Konatiga ludo: ĉiu siavice prezentiĝis aldonante al sia nomo kromnomon pri blanko (*neĝo, blanka vino, papero, fantomo, jogurto, lakto*)
- ✓ Post la matena kvazaŭhora gramatiktempo ni gimnastikis:

Kunkune ronde. Ĉu vi vidas ĉies ŝultrojn? Do ekde mi, ĉiu dua gimnastikanto ĉirkaŭiru dekstren tuŝante ies ŝultron iufoje maldekstre, aliafoje dekstre. Kiam li aŭ ŝi retrovas sian lokon, la aliaj same agas. Ĉu ĉies ŝultroj estis tuŝitaj? Kies ŝultroj ne? Nenies, bone! ...

- ✓ Ludo de la priblankaj francaj esprimoj:

Du skipoj en du duonaj cirkloj ĉirkaŭ la tabulo. Blankuloj kontraŭ nigruloj dispartigitaj per go-ĵetonoj. Ĉiu ludanto ricevas francan esprimon entenante la vorton "*blanc*". Post preparo, la tasko estas, parolante Esperante, divenigi ĝin kaj ĉefe sian Esperantan tradukon al la alia skipo. Divenantoj ricevas po 2 poentojn por ĉiu ĝusta duobla respondo en 2 minutoj. (1 poenton por duona respondo). Divenigantoj gajnas unu poenton se ili bone klarigis. Ekz: "*Blanc comme un linge*" = *simila al blanka tuko, rilate al homo* = PALEGA, "*Blanc comme neige*" = *farinta nenian malbonaĵon* = PURA, SENKULPA, ...

Tiu ludo, krom paroligi la homoj, celas montri, ke vortalvorta traduko el la nacia lingvo plej ofte ne taŭgas.

- ✓ Kunpikniko: oni provas ne krokodili!
- ✓ Sociludoj. Post la manĝo necesas iom ripoziga tempo. Sociaj ludoj tiam estas taŭga agado por trankvila digesto kaj samtempa lingva komprenado-parolado.
- ✓ Posttagmeza preskaŭ-hora gramatiktempo sekvata de gimnastiketo.



*Ana montras foton
de bankizo*

- ✓ Verkada ateliero

Duope kaj uzante la indikojn, verku fantazian sekvaĵon por la jena frazkomenco: *Iam en fora lando ...*

Donitaj indikoj = fotoj pri blankaĵo + blanka ŝnureto + verda stelo

- ✓ Vortludoj.
- ✓ Adiaŭa sketĉo.

Rimarkoj: por ke la partoprenantoj ne enuu, la tago estu zorge kaj precize preparita. Dum 7 horoj, la homoj absorbiĝas en la lingvon kaj multe cerbumas. Iuj ne kutimas streĉi sian menson tiel longe. Necesas do senĉese

vigligi ĉies atenton. Pro tio la diversaj okazaĵoj daŭru malpli ol unu horon kaj sekvu unu la alian kun neniu senaga tempo.

Mi ankaŭ ĉiufoje petas helpon de kungvidanto, kio ebligas proponi du-nivelan gramatiktempon.

En la unuaj sezonoj ni esploris plurajn ĝeneralajn temojn, kiel la E-a movado, sciencoj, sportoj, artoj, vojaĝoj ... kaj ekde du jaroj mi malkovris por-mi-tute-novan ludpedagogion, kiun mi nomis *plena ŝajnigado*. Ĝi konsistas el granda rolludo en limigita loko kiel domo, vilaĝo, ... kaj kiu daŭras la tutan sezonon. Tiu metodo devenas de instruado de la franca en Francio al eksterlandanoj.

Sed tio estas alia rakonto ...

Elisabeth LE DRU, Francio

Fulmrapida komparo

Dum iu lertiga kurso en mia instruista aktiveco mi aŭdis jenon:

Se oni aŭdas iujn vortojn en iu lingvo, oni elprenas el la dorma memor-kapablo ĉiujn siajn konojn pri tiu lingvo kaj metas ilin en viglan memor-kapablon. En tiu momento komenciĝas fulmrapida komparo kun la aŭditaj vortoj kaj la konataj vortoj. Tiel povas naskiĝi kompreno, tiel povas aperi la signifo de la kunmetitaj sonoj.

Fakuloj klarigas, ke ekzistas fenomeno nomata „eko” (en: *priming*; de: *Bahnung*; fr: *amorçage*), kiu pravigas tion: kompreno de vortoj baziĝas sur antaŭaj konoj de aliaj vortoj kaj komparo okazas. Konstruante pozitivajn bazajn konojn, oni stimulas bonan akiron de pliaj konoj.

Okazis al mi jeno:

Mia filino venis al mi kaj demandis: „Panjo, kion signifas [haj]?”

Hazarde miaj pensoj iris al la japana lingvo kaj mi respondis: En la japana „haj” signifas „jes”.

Tuj ŝi vikle respondis: „Ne! En la germana!” Sekve mi devis forigi miajn magrajn konojn de la japana kaj alŝuti miajn konojn de la germana kaj kapablis informi ŝin dirante: „Hai, Haifisch, estas ŝarko, danĝera fiŝo”.

Fakuloj klarigas, ke tie oni saltis de unu bazo, vorttrezoro, al alia bazo.

Okazis al mi jeno:

Mi nun restadas en Togolando por AMO-seminario de UEA. Mi estis kun 29 esperantistoj. Unu persono venis al mi dirante: „[vige:tesi:nen?]”

Mi ne komprenis. Iu alia diris: „Li parolas al vi germane. Vi scipovas la germanan!” Jes, mi scipovas la germanan, sed aŭdi la germanan en 2014 en Togolando, tio estas surprizo, ŝoko, ... Mi rediris al mi enkaŭpo la sonojn kaj saltis al „Wie geht es Ihnen?” Do mi devis forigi miajn konojn de la franca kaj de Esperanto kaj alŝuti mian vortprovizon de la germana por komenci tiun fulmrapidan komparon kaj atingi la signifon de tiuj sonoj.

El tio oni povas konkludi, ke instruado nur en la cellingvo faciligas la paroladon de la lernantoj. Vidu la Cseh-metodon. La instruisto povas proponi momentojn nur en la cellingvo kaj momentojn kun klarigoj en la denaska lingvo de la lernantoj. Severa rigida instruisto, kiu komplete malpermesas eĉ unu vorton en la denaska lingvo, malmotivas siajn lernantojn. Ni ne estu tro striktaj. La plej bona solvo estas, kiam la instruisto ne scipovas la denaskan lingvon de siaj lernantoj!!

Mireille GROSJEAN

Nelson MANDELA „Longa marŝado al libereco”

(lastaj paĝoj)

„Mi ne naskiĝis kun malsato al libereco. Mi naskiĝis libera... libera laŭ ĉiuj manieroj, kiujn mi povis koni. Mi estis libera kuri tra la kampoj proksime de la domo de mia patrino, libera naĝi en la pura rivereto, kiu trafluis mian vilaĝon, libera rosti maizon sub la steloplana ĉielo kaj libera rajdi sur la larĝa dorso de la malrapide paŝantaj bovoj. Tiel longe dum mi obeis mian patron kaj respektis la kutimojn de mia tribo, la leĝoj de homo aŭ Dio ne maltrankviligis min.

Nur tiam, kiam mi eksciis, ke mia infanaĝa libereco estas nur iluzio, mi malkovris kiel juna viro, ke mi jam perdis mian liberecon, ĉar mi komencis malsati je ĝi. Komence, kiam mi estis studento, mi volis liberecon nur por mi mem; mi volis mallongdaŭran liberecon por resti ekstere dumnokte, por legi tion, kio plaĉis al mi, por iri al iu loko de mi elektita. Pli poste kiel juna viro en Johannesburg mi ekdeziris fundamentajn kaj honorajn liberecojn,

konkretigi miajn eblojn, gajni mian vivon, edziĝi, fondi familion... liberecon ne vivi kaptita en maljusta vivo.

Tiam mi pli kaj pli malkovris, ke ne nur mi ne estas libera, sed ke miaj gefratoj same ne estas liberaj. Mi konstatis, ke ne nur mia libereco estas reduktita, sed same tiu de ĉiuj, kiuj samaspektas kiel mi. Tiam mi aliĝis al la Afrika Nacia Kongreso. Tiam mia malsato je persona libereco fariĝis pli granda malsato je libereco por mia popolo.

Pro tiu deziro je libereco, por ke mia popolo povu vivi en digneco kaj memrespekto, juna timema viro fariĝis kuraĝulo, leĝrespekta advokato fariĝis krimulo, edzo amanta sian familion fariĝis senhejma homo, viro vivŝatanta devis vivi kiel monaĥo. Mi ne estis pli virta nek pli fordonema ol iu alia, sed mi malkovris, ke mi ne povas uzi la etajn limigitajn liberecojn, kiujn oni donas al mi, dum mi sciis, ke mia popolo ne estas libera. Libereco estas neerigebla: la katenoj portitaj de iu el miaj popolanoj estis portataj de ĉiuj; la katenojn portatajn de ĉiuj mi portis same.

Dum tiuj longaj solecaj jaroj la deziro je libereco por mia popolo fariĝis deziro je libereco por ĉiuj, Blankuloj kaj Nigruloj. Mi tute bone sciis, ke perfortanto devas esti liberigita same kiel perfortato. Homo, kiu senigas iun alian homon je libereco, estas kaptita de sia malamo; li staras malantaŭ bariloj el antaŭjuĝoj kaj mensmallarĝeco. Mi ne estas vere libera, se mi senigas iun homon je lia libereco, same kiel mi ne estas libera, se oni senigas min je mia libereco. Perfortanto kaj perfortato same dependas de sia homeco.

Kiam mi forlasis mian malliberejon, tia estis mia misio: liberigi la perfortanton kaj la perfortaton ambaŭ. Iuj asertas, ke la celo estas atingita. Sed mi scias, ke ne estas tiel. La vero estas, ke ni ankoraŭ ne estas liberaj; ni nur atingis la liberecon esti liberaj, la rajton ne esti perfortataj. Ni ankoraŭ ne faris la lastan paŝon de nia vojaĝo, ni faris nur la unuan paŝon laŭ pli longa kaj eĉ pli malfacila vojo. Ĉar esti libera ne konsistas nur je forĵeto de siaj katenoj; temas pri vivo laŭ maniero, kiu respektas kaj plifortigas la liberecon de la aliaj homoj. La vera laboro celanta liberecon ĵus komenciĝis.

Mi sekvis tiun longan vojon al libereco. Mi klopodis ne heziti; mi ofte faris mispaŝojn. Sed mi malkovris sekreton: post grimrado sur alta monteto oni malkovras, ke restas multaj aliaj atingendaj montetoj. Mi iom haltis por ripozi, por admiri la belegan pejzaĝon ĉirkaŭ mi, por rigardi malantaŭ mi la

longan faritan vojon. Sed mi povas ripozi nur dum momenteto: kun mia libereco venas respondecoj kaj mi ne rajtas ripozi pli longe, ĉar mi ne atingis la finon de mia longa marŝado.”

Nelson MANDELA: Long walk to freedom / Un long chemin vers la liberté / Longa marŝado al libereco. 1994

El la angla kaj franca tradukis Mirejo GROSJEAN

Nova rubriko:

ILEI kaj UNESKO

Tiu rubriko aperos ekde nun en ĉiu numero de IPR.

Instigas min la artikolo de Ron GLOSSOP en IPR 2014/3 paĝo 14

Faktoj:

1977: La tiama Ĝenerala Direktoro de Unesko s-ro Amadou Mahtar M'BOW partoprenis la UK-on en Rejkjaviko, Islando.

2008: Niaj delegitoj ĉe Unesko Monique ARNAUD kaj Jean-Pierre BOULET oficiale transdonas al Unesko verketon pri „Tarofolio”, vitaminriĉa planto. Tiu libreto estis verkita en laborgrupo okaze de ILEI-Konferenco en Porto Novo, Benino, en 2008.

2010: Mi povis paroli kun la eks-Ĝenerala Direktoro de Unesko, Federico MAYOR en Oslo, Norvegio, okaze de kongreso pri paco por celebri la centan datrevenon de Nobel-Pacpremio por *International Peace Bureau*. Mayor reagis pozitive al mia mencio de Esperanto.

2014: La nuntempa Ĝenerala Direktorino Irina BOKOVA permesas (aŭ postulas), ke sur la oficiala retejo www.unesco.org ŝia parolado por la tago de la gepatra lingvo (21an de februaro) aperu en ŝia lingvo la bulgara, en Esperanto kaj en la 6 laborlingvoj de Unesko.

Regule aperas en Parizo niaj delegitoj; ili rajtas partopreni la kunsidojn kiel observantoj.

„Denove nun ekzistas tre bona rilato inter Esperanto kaj Unesko.” Tiel finiĝas la esperplena teksto de Ron GLOSSOP.

Instigas min la interparolado kun s-ino Colombo en la sidejo de Unesko en Parizo la 6an de oktobro 2014. Mi iris al Unesko por esplori, kiel ILEI povus, povos reakiri ian kunlaboran statuson kun tiu tutmonda institucio. Ŝi informis min, ke iu kandidato nepre trovu iajn eblojn kunlabori kun

Unesko, kaj tiuj kunlaboroj (kun raportoj kaj pruvoj) devas aperi en la kandidatiĝa dokumento. Sen kelkaj tiaj kunlaboroj la oficistoj de Unesko eĉ ne rigardas la dokumenton... Mi devos plu esplori, kiel tiaj kunlaboroj povas aspekti, pri kio temas ekzakte. Poste mi povos informi ĉiujn niajn membrojn, ĉiujn niajn sekciojn.

Jam nun mi povas mencii kaj gratuli Kubo-n kaj RD Kongo-n. Tiuj du Landaj Asocioj de UEA jam sukcesis atingi agnoskon de sia nacia Unesko-Komisiono. Sekvenda ekzemplo.

Ni devas ekkoni la jarmilajn celojn de Unuiĝintaj Nacioj, ni devas ekkoni la agadojn de Unesko kaj labori paralele, samcele. Farante tion, ni devas akiri pruvojn, per fotoj, gazetaj artikoloj, kunlaboro kun lokaj instancoj oficialaj. En ĉiu lando esperantistoj esploru pri kontaktoj, rilatoj, agnosko fare de la nacia Unesko-Komisiono. Unue montri intereson, ekkoni, kunlabori. Poste submeti kandidatiĝon. Fine falos decido de la Ĝenerala Direktorino Irina BOKOVA. Ni provu!

*Mireille GROSJEAN
Prez de ILEI*

Instrui pacon

Responde al Mihail Trifoi (Vidu IPR 2014/3, paĝo 18)

„MALJUSTE!! TIO ESTAS MALJUSTA DISDONADO!! Vidu! Li ricevis dikan sandviĉon, oranĝosukon, pomon kaj jogurton, kaj mi... mi ricevis nur panon kaj akvon!! Mi koleras!! Mi ŝatus bati lin!! Certe mi batos lin!!” Tion mi aŭdis, kiam mi lanĉis aktivaĵon: „La kolera manĝo”. El kvar piknikoj unu estas luksa kaj tri estas magraj: nur pano kaj akvo. Imagu grupon el 24 junuloj, kie 18 vidas la 6 ceterajn gustumi abundan manĝon... Kolero aŭdiĝas. Tia aktivaĵo simbolas la situacion en la nuna mondo. La partoprenantoj sentas, flaras, gustumas, spertas fizike kaj konkrete la maljustecon de nia mondo. (Detala priskribo legiĝas en <http://www.noos.ch/ideo/aktivecoj.php?L=eo>)

Lernantoj kaj gepatroj de ili diris al mi: „Se ni forgesus ĉion de nia lerneja tempo, tiun lecionon ni neniam povos forgesi”.

Se instruado pri paco, solidareco, toleremo konsistas el prelegoj, klarigoj, konsiloj, la aŭskultantoj tuj forgesos. Se la studentoj ion faras, manipulas, spertas, ili memoros tiun sperton. Instruado pri paco nepre estu konkreta.

„La kolera manĝo” estas unu el la diversaj aktivaĵoj, kiujn instruistoj povas organizi tiucele.

En 2002 mi ricevis peton koncepti plenan instruprogramon pri edukado al paco. Tion mi faris. Bv esplori inter la versioj en dek lingvoj.
<http://edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=41&s=c1c3411b796a0713cdb33e5b35c99476> Se versio en via lingvo ankoraŭ ne ekzistas, bv helpi tradukante en vian lingvon!

Venos du afrikaj lingvoj, ewe kaj bambara, danke al Raymond AFANTCHAO, profesoro pri homaj rajtoj en la universitato de Lomeo.

Legante la tekston de mia amiko Mihai TRIFOI, mi hontis, ke mi ankoraŭ ne sukcesis traduki en E-on mian kurson pri konfliktoŝolvido. Temas pri 50 paĝoj en la franca... Mi instruis per ĝi dum pluraj jaroj al gejunuloj. Ĉiuj esprimis sin pozitive pri tiu kurso kaj asertis: „Ĉiuj homoj devus ricevi tian instruadon!” Se tiu kurso estus en E-o sur la Reto, iuj personoj en la mondo povus elŝuti kaj uzi ĝin. Tempo mankas al mi.... Kie trovi 48-horajn tagojn?

Solvo montriĝas en Togolando: Apelete AGBOLO pretas fari tiun tradukon. Mi plu informos vin pri tiu tradukado, kiun Germain PIRLOT el Belgio pretas kontroli.

Mireille GROSJEAN

El la landoj kaj sekcioj...

Francio

La franca Esperanto-kastelo Greziljono invitas:

2015-aprilo-17/26: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kaj internaciaj KER-ekzamenoj.

2015-aŭgusto-01/08: Lingva semajno kun kursoj, prelegoj kaj pli.

2015-aŭgusto-08/16: Festa Semajno por infanoj kaj familioj.

Vidu rete: www.gresillon.org/agendo.

Fotetoj troviĝas tie malsupre: <http://gresillon.org/fotoj>.

Bert ŜUMAN, <bert.schumann@gmail.com>

Unesko invitis la NeRegistarajn Organizojn (NRO)

Dum 3 tagoj okazis Internacia Konferenco de NROj ĉe UNESKO en Parizo de la 15-a ĝis la 17-a de decembro 2014. Partoprenis en ĝi pli ol 100 NROj kaj nova Ligkomitato estis elektita, same nova prezidanto... fakte prezidantino, Martine LEVY, kiu anstataŭas Patrick GALLAUD. Pro lia partopreno – kiel observanto – al la brazila Universala Kongreso en 2002, la reprezentantoj de UEA kaj ILEI ĉe UNESKO bone konas lin. Nun s-rino Martine LEVY reprezentas la ina-n asocion de Skoltoj kaj ŝi estas bone informita rilate al Esperanto.

La unua tago estis dediĉita al administraj aferoj. Poste estis raportoj pri diversaj temoj: Plivalorigo de la kultura heredaĵo kaj favorado de la diverseco de la kulturaĵoj; gravas la sinteno de la junuloj por protekti kaj savi la materian kaj nematerian kulturan heredaĵon. NROj povas ludi gravan rolon por lukti kontraŭ ŝtelado kaj limigi ĝin tra informo al la civila socio kaj kunlaboro kun Interpol. La Ligkomitato sukcesis organizi forumojn en Ĉilio, Bulgario kaj Ebura Bordo, tio estas malfermo al la mondo.

„Beligi la mondon per la agendo post 2015”, zorgante pri bonkvalita edukado, kultura heredaĵo, diverseco de kulturaĵoj, akvo kaj atento pri klimatsanĝiĝo. La NROj estas petataj pli kaj pli kunlabori kun UNESKO. Pro drasta limigo de la tempo homoj provis paroli tre rapide sed la interpretistoj forte grumblis, ĉar ili tute ne havis tempon por traduki.

Partoprenis, kiel observantoj, nome de ILEI, Monique Arnaud, Jean-Pierre Boulet kaj Pascale Voldoire [*vd la foton*]; ili sukcesis enmanigi kelkajn du-lingvajn varbilojn – nova doku-

mento de ILEI – kaj pli ol 100 kalendaretoj 2015 kuŝis sur tablo ĉe la enirpordo kaj preskaŭ ĉiuj malaperis.

Reprezentis UEA Renée TRIOLLE, Veronika POÓR (nome de TEJO) kaj François LO JACOMO.



Raportis Monique ARNAUD

Germanio

De Nepalo al Herzberg

En Kathmandu, Nepalo, multaj lernantoj en Southwestern College eklernis E-on dank' al la iniciatemo kaj persista instrulaboro de Mian Salam Shany. La lernantoj finis Mazi-kurson, kelkaj el inter ili jam entuziasme kaj bone uzas la lingvon, pluraj fariĝis uzantoj de Facebook kaj aperigas siajn unuajn mallongajn mesaĝojn en E-o.

Al la lernantoj aliĝis ankaŭ du instruistoj, inter ili sinjoro Hari Singh K.C., vicedirektoro de la lernejo, ja ili ekhavis la planon viziti en la vintra feriaro Eŭropon, Germanion per helpo de E-o, per la organiza laboro de Interkultura Centro Herzberg. Ili fariĝis invititoj de la E-urbo kaj post urborigardado en Frankfurt am Main kaj Berlin ili alvenis al Herzberg am Harz.



La 34 gelernantojn kun 3 instruistoj en E-o kore bonvenigis la urbestro Lutz Peters en la bela Welf-Kastelo. Ankaŭ prelegis kaj bonvenigis la grupon en E-o la eksurbestro Gerhard Walter. En la plenplena Kavalira Salono ankaŭ ĉeestis la vicurbestro Ulrich Schramke, multaj membroj de la urba konsilantaro, invititaj gastoj, instruistoj kaj lernantoj de la meza lernejo kaj la gimnazio de Herzberg.

La gelernantoj el Nepalo kunportis riĉan kulturprogramon: ili kantis la himnojn de Nepalo kaj Esperanto, altnivele prezentis popolajn dancojn en elegantaj folkloraj roboj, ni aŭdis tamburmuzikon, gitarludon, gajajn ŝlagrojn en la nepala lingvo. Estis bonhumoraj horoj. Poste ili vizitis la kastelon, rigardis la E-ekspozicion kaj alvenis al la gimnazio, kie la direktorino Brigitte Götz tutkore bonvenigis la gastojn kaj Christopher Koch gvidis ilin tra la moderna lernejo.

Estis interese por la gastoj enrigardi en gemanan lernejon kaj havi la okazon demandadi pri la lernejo, studfakoj, fremdlingva instruado, lernejaj kutimoj kaj aŭdi ankaŭ pri la E-instruado en Ernst-Moritz-Arndt Gimnazio kaj la antaŭ nelonge finiĝinta Comenius-projekto.

Plua vizitcelo estis la urba biblioteko, kie jam estas troveblaj multaj E-libroj en la nova E-sekcio. Tie ili povis vidi faklibrojn, vortarojn, famajn

verkojn, infanliteraturon en E-o. Por la plej multaj nepalaj lernantoj tio estis la unua renkontiĝo kun E-libroj, ili ĝojis havi ne nur lernolibron en la mano kaj miris pri la diverseco de literaturo en la internacia lingvo. Poste sekvis vizito al la Esperanto-Centro, kie Petro Zilvar kaj Zsófia Kóródy montris la grandan librokolektaĵon, gazetarkivon kaj rakontis pri la multflankaj E-agadoj. Laŭ nia kutimo ni bonvenigis la gastojn per hisado de ilia nacia flago, kiu kun la flirtanta E-flago montriĝis bela fono por pretigi grupfotojn antaŭ la E-Domo.

Poste per la rondpromeno en la Esperanto-urbo, rigardado de multaj ZEO-j, E-ŝildoj, monumentoj plenumiĝis la deziro de la studenta grupo konatiĝi kun E-o kaj E-parolantoj en la E-urbo. Ni esperas, ke tiu vizito fortigos ilian lernemon kaj post plua lernado de E-o ili fariĝos spertaj lingovuzantoj. Fotoserio: http://esperanto-urbo.de/gallery.php?gallery_id=81100006



Zsófia KÓRÓDY

Kubo


PIV sufiĉas por feliĉigi homon!

Mi heredis malnovan PIV de iu svisa samideano. Ĝi kuŝis ie en mia libro-bretaro. Venis forta voko el Kubo: mi bezonas vortaron!!! Konsekvence mi pakis tiun PIV kaj sendis ĝin al nia samideano Juan Carlos el Havano. ILEI pagis la afrankon.

La 13-an de decembro 2014 alvenas jena konfirmo de ricevo:

Saluton, Estimata s-anino kaj amikino Mirejo!

Kia belega kaj neatendita SURPRIZO!!!, el via Svislando, pli ekzakte el la urbo/vilaĝo Les Brenets alvenis ĝis mi trezoro ene de kartona skatolo; tiun libregon mi nomas tiamaniere, malgraŭ ke ĝi estas nek el oro, nek el arĝento, sed ĝi konsistas el multaj malsimilaj konoj pri E-o, ekzemploj kaj konsiloj por la bona uzado de vortoj kaj de la lingvo ktp. Viaj vortoj skribitaj sur blua papera folio: "Lernu diligente! Elkore salutas Mireille Grosjean" estas saĝaj kaj prudentaj. Vi ĝuste sendis la pakaĵon la 3-an de novembro 2014, kaj mi pasintjaŭde, la 11-an de decembro, ricevis ĝin ĉe poŝto-oficejo. Mi profitas la okazon por sendi al vi



fotojn pri PIVo de E-o donacita de vi, kiu ekde nun iĝos mia nobla kaj nedisigebla kompano. Estimata Mirejo, mi dankegas vin pro via jarfina kaj por-paska donaco; ni ĉiuj konscias, ke por iu ajn esperantisto havi bonan lernilon, kiu povas esti, ekzemple lernolibro, vortaro, ekzercaro, legolibro, ĉiam helpas sian posedanton plialtigi lian/sian lingvan nivelon, precipe, la vortaro plibonigas la E-vortprovizon kaj nur poste, helpe de la praktikado: babilante, instruante la lingvon aŭ legante diversajn librojn, ni certe atingos la atendatajn sukcesojn.

La PIVo ricevita de mi, estas praktike nova, malgraŭ ke ĝia eldona jaro estas 1970.

Nepalo

Nepalaj semoj, akvumitaj de franca esperantistino

Gelbu, nepala ĉiĉerono, vojaĝis al Francio en januaro 2014; li venis por perfektigi sian paroklapablon de la franca lingvo, por renkonti vojaĝontojn kaj organizi ilian vojaĝon laŭ iliaj deziroj. Tiel mi decidis vojaĝi al Nepalo „por vidi la montojn de for kaj la homojn de proksime”. Kvar sepdekjarulinoj vojaĝis al Katmandu kaj poste al Pokhara, inter ili du e-istinoj, Germaine kaj mi. Tuj mi anoncis mian vojaĝon al la prezidantino de

NESPA, ĉar mi antaŭvidis ne nur piedvagadi en la montaron sed ankaŭ viziti esperantistojn kaj lernejojn.

Surloke ni ĉefe vizitis la vilaĝojn en la ĉirkaŭaĵo de Pokhara kaj plurfoje povis rilati kun la loka instruisto. En vilaĝo Lipeyani ni estis bone akceptitaj de la lernejestro kaj poste mi malkovris, ke patro de iu e-isto en Katmandu instruis tie dum 25 jaroj... kia malgranda mondo! En Pokhara estis plezuro konatiĝi kun loka e-isto kaj same kiel en la filmo de Mazi, ni motorciklis tra la urbo por viziti ejon, en kiu oni povas uzi la reton.

S-ro M.S.SHANY bonege organizis renkontiĝojn kun lernantoj en 2 diversaj lernejoj, *Southwestern State College* kaj *Scholars Home Academy*. Kvankam estis ferioj, li sukcesis venigi multajn lernantojn kaj estis granda plezuro, kiam la traduko okazis de E-o al la nepala lingvo! La lernantoj estis tre scivolemaj kaj mi kuraĝigis ilin plulerni E-on!



Por la loka grupo en la Esperanto-Domo de Katmandu mi planis prezenti nuntempajn virinojn, kiuj sukcesis famiĝi en diversaj kampoj kaj kun kiuj mi persone konatiĝis: Marjorie Boulton, Katalin Faragó, Zsófia Kóródy, Kristin Tytgat, Claude Nourmont, Katalin Kováts, Anna Löwenstein, Franciska Toubale, Mirejo Grosjean, Spomenka Štimec, Barbara Pietrzak, Ilona Koutny, Renée Triolle. Tio, kion mi ne antaŭvidis ...estas, ke partoprenis pli ol 30 viroj kaj nur 3 virinoj! Ĉu bone elektita temo? La publiko bone reagis!

Tio, kio mirigis min dum mia restado tie, estas la premo de la angla lingvo: multaj gepatroj – kiam ili scipovas – provas paroli angle hejme, por doni al la infanoj pli da ŝancoj por la estonteco. Eĉ en izolitaj vilaĝoj la infanoj ne

salutis nin per la kutima afabla vorto „Namaste” sed ni aŭdis „hello”, „good morning”... kaj mia koro suferis kiam mi aŭdis petojn: „donu al mi monon”, „donu al mi skribilon” en la angla... infanoj iĝas almozpetantoj, kiam ili vidas turistojn. Nia grupo decidis doni monon nur al respondeculoj de lernejoj kaj en Lipeyani tio estis granda helpo, ĉar estis planita vojaĝo al la ĉefurbo Katmandu por la plej aĝaj lernantoj. Angla paro venis kun ni por viziti tiun lernejon; tiel la donita sumo estis pli alta.

Gelbu interesiĝis pri E-o, mi eĉ ricevis la kromnomon „Saluton” ĉar el la kvar virinoj de nia grupo du nomiĝas Monique! En Katmandu mi estis bone akceptita de la e-istoj kaj povis viziti plurajn familiojn, sed nur la viroj parolis Esperante, tamen mi sukcesis bone rilati kun virinoj; la manĝaĵoj estis ĉiam bongustaj kaj vizaĝoj ridetemaj. Tiu vojaĝo al Nepalo helpis min konatiĝi kun aliaj kulturoj, relativigi okcidentajn problemojn kaj plenigis mian menson per mirindaj memoraĵoj.

Raportis: Monique ARNAUD

Rusio

La 14-an de novembro 2014 en Rusia Universitato De Amikeco inter la popoloj (RUDN) dum kunsido de la Scienca Konsilio estis akceptitaj du studprogramoj por E-instruado. La 19-an de novembro laŭ la specialaj ordonoj ili estis oficiale validigitaj. Ĉar RUDN estas ŝtata universitato de federa nivelo kun rajto de memdifino de la studprogramoj, tiuj ĉi programoj iĝis aŭtomate tutrusiaj kaj atestiloj de la sukcesintoj estas agnoskataj tra tuta Rusio kaj en dekoj da landoj, kiuj havas specialajn edukadajn kontraktojn kaj interkonstentojn kun Rusio. La unua studprogramo nomiĝas *Baza kurso de E-o* kaj celas studentojn kaj homojn, kiuj jam havas universitatan kleron. Fininte tiun kurson, la lernantoj rajtas ricevi ŝtatan atestilon pri aldonaj profesiaj konoj. La dua studprogramo celas lernejanon de la lastaj studjaroj kaj ajnajn aliajn homojn sen universitata diplomo. Ankaŭ ĝiaj finintoj ricevas specialan atestilon. Fine de novembro la unuaj du grupoj de lernantoj komencis lerni E-on laŭ tiuj ĉi programoj en RUDN. Tiujn kursojn antaŭis senpaga 5-leciona „fulmo-kurso”, kiun sume partoprenis pli ol 30 personoj en 3 grupoj. La finintoj ricevis honorajn diplomojn kun subskribo de la dekanato de filologia fakultato. Eldonejo Impeto donacis por la kurso libretojn kun E-gramatiko, kiuj estis senpage disdonitaj al ĉiuj partoprenantoj de la kurseto.

laŭ Dima ŜEVĈENKO, retumanto@gmail.com

JUNA AMIKO – 40 jaroj – ĈIUJ NUMEROJ EN LA RETO!

Juna Amiko estas internacia Esperanta revuo por lernejanaj kaj komencantaj, eldonata ekde 1974 de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, ILEI. La revuo ekde la komenco aperas seninterrompe, helpas lernantojn de la lingvo, kaj antaŭ kelkaj monatoj festis sian 40-jaran jubileon.

Lige al la 40-jara jubileo de *Juna Amiko*, kiel komuna projekto de ILEI kaj Lingvo-Studio en Budapeŝto, ni skanis ĉiujn 133 ĝisnunajn numerojn de la revuo kaj deponis ĝin en interreta biblioteko por publika legado en pdf-formato. Adreso de la biblioteko: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>

Estante la freŝaj numeroj aperos en la biblioteko kun 2-jara prokrastado.

Ĉefa motoro kaj longtempa redaktoro de la revuo estis s-ro KURUCZ Géza, nun honora membro de ILEI. Ekde la pasinta jaro la revuo estas redaktata kaj prizorgata de Stano MARĈEK.

– Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>

– Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko

laŭ László SZILVÁSI, Lingvo-Studio (teksto prenita el edukado.net)

Pri la afiŝo sur la dorsa kovrilo de IPR 2014/4

La afiŝon kreis la grafikistino *Barbara CAIN* el Berlino, kiu ne nur respondecas pri la grafika prezento sed ankaŭ pri la organizo kaj kvalito de la diverslingvaj tradukoj. La iom alia originala afiŝo (kun la centra teksto en la irokeza, germana kaj angla lingvoj) same aperis en la *eldonejo Eisenkorn/Berlino*. La eldono de la afiŝo en la nuna prezento kun la *teksto en Esperanto en la centro* kaj **pluaj 118 lingvoj** (formato 60 x 42 cm) estas iniciato de familio Blanke. La esperantigon de la indiana saĝaĵo (de irokezo) faris la irlanda diplomato Seán O'RIAIN.

Jen la teksto, tradukita en la menciitajn lingvojn:

Paco ne estas nur la kontraŭo de milito, ne nur la periodo inter du militoj. - Paco estas multe pli. Paco estas la leĝo de la homa vivo. Paco estas tiam, kiam ni agas juste kaj kiam inter ĉiuj unuopaj homoj kaj ĉiuj popoloj regas justeco.

Sur la afiŝo krome troveblas jena atentigo: Kontaktoj: *Universala E-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam*. Apud tio estas spaco por plua adreso. Krome oni trovas jenajn retadresojn: *uea.org, lernu.net, esperantic.org*.

La afiŝo ne estas evento-dependa kaj efike montreblas ĉe ĉiuj aranĝoj, kie temas pri lingvoj kaj pri E-o. Ni pretas donaci al ILEI kaj/aŭ al la sekva ILEI-kongreso kvanton da ekzempleroj, por ke ĉiu kongresano havu almenaŭ 1 ekzempleron por koni ĝin kaj povi laŭbezone mendi ĝin ĉe UEA.

Amike salutas: Wera kaj Detlev BLANKE

AMO en la duan jaron

La januara numero de la revuo *Esperanto* (p. 8) resumas la ok trejn-seminariojn okazintajn en kvar kontinentoj kadre de la nova programo de UEA pri Aktivula Maturigo (AMO) tra ĝia fondjaro, 2014. Ĝi plie skizas la kvin akceptitajn seminariojn por 2015 kaj la plian kvinon da kandidatoj. La teksto en precize 25 vortoj difinas la gamon de eblaj seminaĵaj temoj. Tio estas vaste inkluziva; la sola escepto – ni lasas la kampon de instruista trejnado al ILEI. Tamen, se iam okazus AMO-seminario kadre de iu ILEI-aranĝo, verŝajne landnivela, ni ja povus trakti temon pri kursgvidado – el pedagogia kaj organiza vidpunktoj. Pensu!

Stefan MACGILL

Vikipedio – alvoko ankaŭ al edukistoj

En la februara numero de revuo *Esperanto* aperos alvoko por Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA kunlabori kun la jam aktiva teamo, kiu ekzempledone prizorgas la pri- kaj per-Esperantan disponon de Vikipedio. Bonvolu legi tiun artikolon, kaj pripensu, kiel ILEI povus ludi utilan rolon en la ampleksigo de la Esperantlingva prezento de edukaj temoj. Unue, necesus pritaksi kaj bonigi la informojn pri ILEI mem, sed gravas ankaŭ zorgi, ke nuntempaj edukaj artikoloj havu adekvatan version en Esperanto. Tiel ni anoncas nin konsiderinda forto en la pedagogia mondo, kun io por proponi en la kampo de lingvo-instruado kaj interkultura riĉigo.

Stefan MACGILL

Pri niaj konferencoj...

Dumkonferencaj kursoj por komencantoj

La Konferenco en Oostende, 17-25 julio 2015, proponas komencajn kursojn de Esperanto kaj allogan turisman programon por la komencantoj. ILEI invitas siajn membrojn en ĉiuj landoj organizi kaj gvidi grupojn de komencantoj el sia lando, kiuj partoprenos la konferencon por lerni Esperanton kaj ĝui la programon speciale adaptitan por ili.

Se vi organizos kaj gvidos tian grupon de komencantoj kaj se vi ĉiuj loĝos en la konferenceja junulargastejo *De Ploate*, vi kiel grupgvidanto ĝuos jenajn rabatojn:

- 50% de la kotizo, se vi gvidas minimume trimembran grupon, 75% por kvarmembra kaj 100% por kvinmembra grupo;
- por ĉiu plusa grupano ekde la 6-a ĝis la 10-a vi ĝuos 5%-an rabaton de la loĝkosto en plurpersona (2, 4, aŭ 6-lita) ĉambro.

Por tiaj konferencanoj – komencantoj en Esperanto – estos organizitaj:

- E-kurso gvidata de instrusperta konferencano, 3-4 horojn ĉiutage
- Ekskursi programo pli riĉa ol por la ordinara konferencanoj laŭ la samaj prezoj kiel por ceteraj konferencanoj; vi mem estos bonvena helpi kiel ĉiĉeron-interpretisto por viaj grupanoj kaj aliĝi al tiaj ekskursoj senpage.

Grave: Bonvolu prizorgi kaj helpi viajn grupanojn, ke ili ĉiuj aliĝu, mendu la loĝadon kaj sendu la pagon ĉu pere de vi, ĉu al konto de ILEI.

La aliĝilon kaj pliajn informojn pri la konferenco vi trovos ĉe

<http://www.ilei.info/agado/Ostendo2015.php>.

Estrarano pri konferencoj, Radojica PETROVIĆ

Simpozio dum la ILEI-konferenco, Oostende, 17-25 julio 2015

Lingva justeco kaj paco: Kiuj defioj por la nuna mondo?

De la somero 1914 ĝis la aŭtuno 1918 okazis unu el la plej grandaj konfliktoj en la historio de la homaro. Ankaŭ en Flandrio la Granda Milito daŭris kvar jarojn. Unu jarcenton poste Flandrio volas rememori la multnombrajn viktimojn kaj kondamni la sensencan perforton. La memor-

programo estas instigilo por ekpensadi pri milito kaj paco. Flandrio volas tre klare ligi la tutan projekton al la ideo de paco sub la slogano “Neniam plu milito”. Tiumaniere nunaj kaj estontaj generacioj ekpensados pri temoj kiel toleremo, interkultura dialogo kaj internacia kompreniĝo. La celo de la flandra projekto estas krei malferman, tolereman socion kun aktiva internacia orientiĝo.

Tio tre necesas en la nuna mondo, kie konfliktoj bedaŭrinde abundas. Ili kaŭziĝas pro malrespekto de kulturoj, religioj kaj lingvoj. Soldatoj bruligas bibliotekojn kaj kulturoj malaperas. Lingvoj ludas gravan rolon en konfliktoj kiel ekzemple en Ukrainio, Irako kaj aliaj. Nur pere de internacia kunlaboro, respekto por homaj rajtoj kaj paco ni povas krei demokratiajn kaj justajn sociojn, kie indas vivi kiel homo.

Nia simpozio volas prilumi tiujn esencajn komponantojn por monda paco kaj la faktorojn, kiuj povas minaci tiun pacon.

Jen kelkaj sugestoj por prelegtemoj:

1. La povo de lingvo / La lingvo de povo
2. Lingvo kaj paco/milito
3. Lingvo, edukado kaj paco
4. Multlingveco kaj demokratio
5. Multlingveco, socia justeco kaj identeco
6. Lingvaj rajtoj kaj lingva justeco
7. Kontribuo de Esperanto al la paco
8. Rolo de lingvo en nuntempaj konfliktoj
9. Lingva diverseco kaj lingva politiko.

Se vi volas prelegi pri tiu ĉi temaro, ni tre kore invitas vin sendi al la organizantoj vian prelegtitolon kune kun resumo de 100-200 vortoj, 3 - 5 ŝlosilaj vortoj kaj ĝis 150-vorta prezento de la aŭtoro. Vian prelegproponon kun tiuj elementoj bonvolu sendi ĝis la 15a de aprilo 2015 al:

kristin.tytgat@skynet.be, kopie al *radojica.petrovic.rs@gmail.com*.

Surbaze de viaj kontribuoj ni redaktos provizoran programon, kiun ni sendos al vi, kaj vi estos petataj sendi kompletan tekston de via prelego ĝis la 15-a de junio 2015. Viaj resumoj estos publikigitaj en la *Konferenca Libro*. Ni ankoraŭ komunikos al vi la kondiĉojn por publikigo de via kompleta prelego.

Por via prelego vi disponos pri 20 minutoj kun 10 minutoj por diskuto.

La lingvo de la simpozio estas Esperanto kun eblaj kontribuoj de neesperantistoj en la angla aŭ la nederlanda. Se la prelego ne okazos en Esperanto, la ĉeestantoj ricevos resumon en Esperanto.

Ni vere esperas, ke vi entuziasme reagos al nia invito partopreni la simpozion, ĉu per kontribuo, ĉu per ĉeesto. La simpozio estas grava aranĝo dum la ILEI-konferenco, kiun ni komune povos sukcese realigi. Precizan daton de la simpozio en la konferenca programo ni ankoraŭ komunikos.

Ĉiuj aliĝintoj de la konferenco aŭtomate rajtas partopreni en la simpozio sen apartaj aliĝilo kaj kotizo. Por tiuj, kiuj volas aliĝi nur al la simpozio kiel preleganto kaj/aŭ aŭskultanto, validas la sama konferenca aliĝilo trovebla ĉe <http://www.ilei.info/agado/Ostendo2015.php> kaj la nur-simpozia kotizo de 30 EUR. **Bonvenon!**

Kristin TYTGAT, prezidanto de la Organiza komitato

ILEI 2016:

Konferenco en Hungario kaj festivalo en Kroatio

En la lasta kvarono de la jaro 2014 la Estraro de ILEI organizis konkurson por elekto de invitanto de la 49-a Konferenco en la jaro 2016. Konkursis du urboj: Bjelovar, Kroatio, kiun kandidatigis la ILEI-sekcio de KEL (Kroata Esperanto-Ligo) kun ankoraŭ tri partneraj E-organizoj el Kroatio, kaj Nyíregyháza (prononco: *njiredjhaza*), Hungario, kandidatigita de la Hungara sekcio de ILEI kun ankoraŭ tri partneroj el Hungario.

Ambaŭ kandidatoj prezentis ampleksan, profesiece preparitan konkursan materialon konforman al la Konferenca Regularo de ILEI kaj konkursa demandaro, ambaŭ kun subteno de lokaj instancoj kaj kulturaj kaj klerigaj institucioj. Nuancaj diferencoj de prezoj, pli taŭga konferencejo kaj la fakto, ke ILEI ne konferencis en Hungario 20 jarojn pli longe (lastfoje en 1981, Gödöllő) ol en Kroatio (lastfoje en 2001, Lovran) decidigis la Estraron elekti Nyíregyháza por konferencloko en la jaro 2016.

Aliflanke, konsiderante, ke estus damaĝe ne utiligi la logaĵojn de Bjelovar prezentitajn en ĝia kandidatiĝo, la Estraro akceptis opinion de la estrarano pri konferencoj, ke indas proponi al la kroataj konkursintoj organizi novtipan eventon de ILEI: festivalon de Esperantaj kulturo kaj pedagogio. La 17-an de januaro ili kunsidis kaj principe akceptis la iniciaton. Nun

sekvas detala traktado de la projekto kunlabore kun la Estraro de ILEI por konkrete plani kaj programi la festivalon.

Konferenco 2016

La 49-a konferenco de ILEI en la jaro 2016, en la semajno post la 101-a UK en Nitra, Slovakio, do, okazos en Nyíregyháza (Njiredjhaza), Hungario, en la lando, en kiu funkcias la partnera institucio de UEA por la internaciaj KER-ekzamenoj de E-o, kaj en kiu iam funkciis E-fako en la universitato ELTE, Budapeŝto, kiu klerigis kaj kapabligis plurajn mondkonatajn fakulojn, kiuj nuntempe aktivas en la Esperanto-movado.



En Hungario E-o havas specialan rolon en la lerneja kaj ekzamena sistemoj. La Konferenco kun internacia partoprenantaro donos internacian atenton kaj subtenon al daŭripovo de tia rolo de E-o, t.e., ke ĝi estu elektebla en universitataj kaj altlernejaj studoj, ke ĝi restu en la ofertolisto por abiturienta ekzameno kaj estu akceptata kiel elekteblo por KER-ekzamenaj postuloj de triagrada edukinstitucioj.

La konferencon gastigos la Altlernejo en Nyíregyháza, kie studentoj rajtas ekzameniĝi pri E-o. Ĝia Filologia Fakultato, kiu kapabligas lingvo-instruistojn, kiel natura medio por konferenco de e-istaj instruistoj, certigos



kaj organizan subtenon al la Konferenco kaj bonajn laborkondiĉojn en siaj moderne ekipitaj prelegejoj. Situanta en la regiono de la famaj Tokaj-vinoj en la montara regiono de la nordorienta Hungario, la konferencurbo kun sia ĉirkaŭaĵo proponas allogajn vizitindaĵojn por konferencaj ekskursoj kaj variajn motivojn por la kultura programo. Moderaj loĝprezoj kun kontentiga komforto en proksimaj hotelo aŭ studenta domo ebligas pli mult-

nombran partoprenon precipe de instruistoj el Hungario mem kaj najbaraj ekssocialismaj landoj, sed ankaŭ de e-istoj el aliaj landoj kaj tiuj el foraj mondopartoj kiuj jam pagos longan vojaĝon por partopreni UK en la najbara Slovakio kaj ŝatos uzi la okazon por ĝui ankoraŭ unu semajnon de la tipa etoso de ILEI-konferencoj kontraŭ moderaj restadkostoĵoj. La proksimume 360km-a distanco inter Nitra, la okazejo de UK, kaj Nyíregyháza traireblas per 4-hora busveturo, aŭ trajne tra Bratislava kaj Budapeŝt, kio ebligas komforte kombini la du eventojn en unu restadon en eŭropa E-ujo.

ILEI-festivalo de Esperantaj kulturo kaj pedagogio

E-o estas ne nur lingvo. Ĝi signifas ankaŭ la komunumon de sia parolantaro kaj la specifan kulturon, kiu donas identecon al tiu komunumo. ILEI kiel organizo de e-istaj pedagogoj havas en la fokuso la pedagogion de E-o, ĉu en la lingvoinstrua fako, ĉu en aliaj edukaj sferoj, kiu ne disigebblas de la kulturo de E-o.

La celo de la planata postkonferenca festivalo en Bjelovar, aŭgusto 2016, estas prezenti panoramon de E-kulturaj kaj E-pedagogiaj atingoj kaj tendencoj, kuraĝigi la E-kulturkreadon, kaj pli vaste malfermi la pordojn de kultura interŝanĝo kaj pedagogia interinfluo de la medioj E-ujaj



kaj ekster-Esperantuja. Diversaj festivalaj programoj kaj formoj kandidatiĝas konsistigi la festivalon, ekzemple: komunaj koncertoj de e-istaj kaj lokaj muzikgrupoj, lingva festivalo, poeziaj vesperoj, beletraj kaj pentroartaj konkursoj, teatraj prezentaĵoj, pedagogiaj forumoj kaj atelieroj, ekspozicioj, etno-sportaj konkuroj, kvizoj, turismaj aranĝoj ktp.

La organizantoj en Kroatio kaj la Estraro de ILEI, konsultante ankaŭ kunlaboremajn fakulojn, pasigos la bezonatajn semajnojn kaj monatojn en la unua duono de ĉi tiu jaro por interkonsenti racian, realigeblan, celtrafan kaj allogan por la publiko kombinaĵon de la deziroj kaj ebloj. La atendebla subteno de lokaj aŭtoritatoj kaj la koncernaj kroataj ministerioj, kiel prezentita en la kandidatiĝo de Bjelovar, esperigas eventon longdaŭre signifan kaj por la Esperanto-movado kaj por la gastiganta medio.

Estrarano pri konferenco, Radojica PETROVIĆ

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIEBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio, tel: (+32-3)-234 34 00*. **Redaktoro:** NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, <jozefo.nemeth@gmail.com>, http://www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530*. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, <moerbeekr@gmail.com>*.

**Ni fermis la nunan numeron la 5-an de februaro 2015,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2015.**

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Mireille Grosjean, Leysester Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Tiekko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

Kontrola: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi. Estrare: Penny Vos.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Ilona Koutny, Bharat Ghimire, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”..

Enmovadaj partneroj (entute 14)

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*.

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/*.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz,
(+49)55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj
ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto
de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org.

Reprezentanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI:

Stefan MacGill.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek**, **Ron Glossop**,
Leysester Miro.

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud**
(ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et
Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne,
FR-63800 Courmon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas **10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la

konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl SELIMI,
Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3,
AL-1016 Tirana,
bselimi@gmail.com

Aŭstralio: Jennifer BISHOP,
24/8 Wallen Rd, Hawthorn,
AU-3122 Victoria,
bishop.jennifer699@gmail.com

Belgio: Marc CUFFEZ,
Elisabethlaan 295,
BE-8400 Oostende,
flandrio@hotmail.be

Benino: ALOFA Jérôme
Charles, 04BP0672 BJ
Cotonou, Rép. du Bénin,
alofkarlo@yahoo.fr

Brazilo: Leysester MIRÓ,
rua Jorge Tiburcia 592, Vila
Mariana,
BR-041-26001 Sao Paulo (SP),
leysester@gmail.com

Bulgario: Mariana
GENCHEVA, Targovska 95,
BG-5180 Polski Trambesh,
maries972@yahoo.com

Burundo: Jérémie
SABIYUMVA, BP 170, BI-
Rumonge, Burundi,
ane_bur@yahoo.fr

Ĉeĥio: Jana
MELICHÁRKOVÁ, Polní 938,
CZ-696 02 Ratiškovice,
melicharkova@quick.cz

Ĉinio: GONG Xiaofeng,
School of Environmental and
Chemical Engineering,
Nanchang University, CN-
330031 Nanchang,
arko.gong@qq.com

Danio: Bent JENSENIUS
Højstrupvej 124, DK-2700
Brønshøj,
bentjensenius@gmail.com

Finnlando: Sylvia
HÄMÄLÄINEN, F.E. Sillanpään
katu 2 C 46, FI-33230
Tampere, sylvia.h@kolumbus.fi

Francio: Michel DECHY,
65 allée de la Crémaillère,
FR-59650 Villeneuve d'Ascq,
michel_dechy@hotmail.com

Germanio: Zsófia KÓRÓDY,
E-Centro, Grubenhagenstr. 6,
DE-37412 Herzberg/Harz,
zsafia.korody@esperanto.de

Hispanio: Luis Eduardo
BERDOR REMON, Pablo
Iglesias 41, 4º B, ES-50018
Zaragoza,
eduardo.berdor@gmail.com

Hungario: József NÉMETH,
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász,
jozsef.nemeth@gmail.com

Irano: Ahmad Reza
Mamduhi, Nr 9, K. Iraj, Kh.
Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-
Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi
IR-19166-13514 Tehran,
manduhi@gmail.com

Italio: Luigia OBERRAUCH
MADELLA, via Prampolini 8,
IT-43122 Parma,
silkovojo@aliceposta.it

Japanio: ISIKAWA Tiekō,
Tate 1-6-6-103,
JP-353-0006

Siki-si, Saitama-ken,
isksanjo@ff.e-mansion.com

Katalunio: Pedro M.
MARTÍN, Arnau Gatell 2,
ES-17300 Blanes,
ileicar@hotmail.com

Kongo DR: Viktor
LUKOLAMA LIFIMPU, Avenuo
Lubaki n° 71, kvartalo Mbaki,
Komunumo de Bumbu,
Kinshasa, RD Congo,
viktorlufimpu@gmail.com

Korea Resp.: PARK
Yongsung,
110-dong 902-ho, Daewoo Ian
Apt. Samke-dong, Gimhae Si,
Gyeongsangnam-Do, KR-621-
750, esabpark@korea.com

Kroatio/KEL: Marija
JERKOVIĆ, Jarunska 6,
HR-10000 Zagreb,
mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Svjetlana
AKIK, Franje Malnara 52,
HR-10000 Zagreb,
ilei@hes-keu.hr



SEKCIOJ DE ILEI

(daŭrigo)

Kubo: Miguel Angel GONZÁLEZ ALFONSO, Cádiz No. 233 apto. 5 e/ Cruz del Padre y Consejero Arango, Cerro, La Habana, Cuba,

Meksiko: Carlos HERNÁNDEZ LOARCA, Arco del Triunfo 2019-40 San Pedrito los Arcos, MX-76148 Querétaro México, ilei@esperanto-mexico.org

Mongolio: Khorloo TSERENDEJID, distrikto BZD, 82-5, MN-Ulanbator, tserendjd@yahoo.com

Nederlando: Robert MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, moerbeekr@gmail.com

Nepalo: Bharat Kumar GHIMIRE, Nepala E-Asocio, G.P.O. Box, NP-10518, Kathmandu,

nespa_bharat@hotmail.com

Norvegio: Anne Karin BONDHUS, Morenefarefaret 8A, NO-4340 Bryne, akbondhus@jkn.no

Pollando: Tomasz CHMIELIK, ul. Jarzębinowa 3/33, PL-21-040 Świdnik, tchmj@wp.pl

Rumanio: Mihai TRIFOI, Str. Principală, Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, mihaitrifoia@yahoo.com

Serbio: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobođenja 36, RS-32000 Čačak, radojica.petrovic.rs@gmail.com

Suda Afriko: Emile MALANDA NIANGA, PO BOX 2787 ZA-Cape Town, emalandan@yahoo.fr

Svedio: Agneta EMANUELSSON, Carl Ugglas väg 6, SE-641 37 Katrineholm, agneta.emanuelsson@fro.se

Svislando: Mireille GROSJEAN, Grand-rue 9. cp 9, CH-2416 Les Brenets, mirejo.mireille@gmail.com

Togolando: ATTIOGBE-AGBEMADON B., Mensah, B.P. 39, Aneho, TG-Lomé, abiovamensah@yahoo.fr

Ukrainio: Volodimir HORDIJENKO, p/k35, Kijiv-133, UA-01133, volodomir@ukr.net

Usono kaj Kanado: Ronald GLOSSOP, 8894 Berkay Avenue, US-63136-5004 Jennings, MO, rglossop@mindspring.com

Vjetnamio: Ngyuyen THI NEP, 70, B20A, Kim Lien, Dong Ha, VN Hanoi, Ngyuennepa9cfl@gmail.com

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida ELBAKJAN, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, Lidaelb@yahoo.com

Barato/Hinda Unio: Venkatesh REDDY, No. 216, Off Main Road, Whitefield, IN-Bangalore 66, Karnataka, esperovr@yahoo.co.in

Britio: Elizabeth STANLEY, Frome House, Frome Gardens, Stroud, Glos. GL5 4LE, UK elistaros@hotmail.com

Ĉilio: Héctor CAMPOS GREZ, Casilla 903, CL-3340000 Curico, hecg@uea.org

Ganao: Alfred Kobina ARTHUR, P.O. Box TS 404, Teshie, GH-Accra, abaako43@yahoo.com

Islando: Loftur MELBERG Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, lofturmsig@yahoo.de

Israelo: Gian Piero SAVIO, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, saviogp@zahav.net.il

Pakistano: Adeel Mahmood BUTT, Ward No. 11, near M.C. High School, PK-39100 Nankana Sahib, adeelbutt84@gmail.com

Rusio: Svetlana SMETANINA, str. Budajskaja 13-35, RU-129128 Moskvo, svsmetanina@yandex.ru

Slovakio: Magdaléna FEIFIČOVÁ, Bernoláková 25/5, SK-010 01 Žilina, ilei.officejo@gmail.com

Tajvano: Reza KHEIRKHAH, Chung Ching Road, No. 105, TW-Pingtung city, 900-73, rezamenghof@yahoo.com

Urugvajo: Sonia RISSO, Pascual Costa 3253 Apto 1215, UY-11700 Montevideo, sonry@adinet.com.uy

KONTAKTPERSONOJ

Argentino: Gabriel Enrique WAGNER, Misiones 1421, AR-3116 Crespo-Entre Rios, gwagner@digitaloffice.com.ar

Aŭstrio: Uwe STECHER, Zaunscherbasse 3/3/6, AT-1210 Wien, punktor@live.at

Bolivio: Leandra DIA RIOS, Calle María Estiváriz No 290, Avenida Coronel Valdez Pasaje Zaratustra, Villa Pabón, Zona Central, La Paz, mileis_7@hotmail.com

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta KULENOVIĆ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Estonio: Helgi HROMOVA, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Haitio: Christine THEANO, Christ-Roi, Imp. Romane # 41, HT-6110 Port-au-Prince, christinetheano@hotmail.com

Indonezio: Ilia Sumilfia DEWI, Perumahan, Pejuang, Pratama, Blok L, no. 11, RT/RW 003/006, ID-Bekasi, Jawa Barat, ilia.dewi@gmail.com

Kenjo: Gilbert S. SIKALA, Chemomi Estate, P.O. Box 22, KE-30301 Nandi Hills, simiyugilbert@yahoo.com

Kostariko: Hugo MORA Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, tikoguau@gmail.com

Litovio: Grazina OPULSKIENE, Tylioji32-22 Mazeikiai, LT-893307, grazopul@yahoo.com

Luksemburgo: Claude NOURMONT, 2 om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, moonmont@pt.lu

Nikaragvo: Uriel GURDIAN, Rpto. Shick 2da etapa, Iglesia adventista 1c O, 1c N. Casa G-32, Managua, Nicaragua, esperantonica@gmail.com

Portugallio: Luís LADEIRA, Rua Manuel Valadares, 10, 2E PT-2650-192 Amadora luisladeira@portugalmail.pt

Tagikio: Firdaus SHUKUROV, Glavpochtamt, a.k.135 TJ-734000 Dushanbe, komintel@yandex.ru; aet2005@yandex.ru

Venezuelo: Asociación Venezolana de E-o, Ricardo COUTINHO, Apartado postal 47675, Caracas 1041-A, VE venesperanto@cantv.net



„Nepalaj semoj, akvumitaj de franca esperantistino.” Vidu la artikolon de Monique ARNAUD (p. 29.) en la rubriko *El la landoj kaj sekcioj*...



juna amiko

februaro 2014 • n-ro 3/2013 (138)

INTERNACIA
ESPERANTO-REVUO DE ILEI
POR LERNANTOJ
KAJ KOMENCANTOJ

Eksterordinara rilato
LUME: La interesa ĉambro
LUDE: Tiuj mirindaj bestoj!
LASTE: Dekelekte

juna amiko

majo 2014 • n-ro 1/2014 (139)

INTERNACIA
ESPERANTO-REVUO DE ILEI
POR LERNANTOJ
KAJ KOMENCANTOJ

Rakontoj pri ursoj kaj formikoj
LUME: El mia kolora vivo
LUDE: Ĉu vi kaŝis ion?
LASTE: Kiel nomi la beston?

juna amiko

aŭgusto 2014 • n-ro 2/2014 (140)

INTERNACIA
ESPERANTO-REVUO
DE ILEI
POR LERNANTOJ
KAJ KOMENCANTOJ

Survoje al lernejo
kiel trovi loĝeblon?
LUME: El mia kolora vivo
LUDE: Ek al novaj aventuroj!
LASTE: Surprizoj en la sudo

juna amiko

novembro 2014 • n-ro 3/2014 (141)

INTERNACIA
ESPERANTO-REVUO
DE ILEI
POR LERNANTOJ
KAJ KOMENCANTOJ

Pri profesioj en Rumanio
LUME: El mia kolora vivo
LUDE: Adiaŭa karto
LASTE: Sentinta enigmo